


# EL POPOLA ĈINIO

6

1973





Meteostacio sur altebenejo

# Inspektado de Samdek Norodom Sihanuk al la Liberigita Regiono de Kamboĝo

En marto de la kuranta jaro, Samdek Norodom Sihanuk, ŝtatestro de Kamboĝo kaj prezidanto de la Nacia Unueca Fronto de Kamboĝo, kaj lia edzino Princino Monique Sihanuk faris longan vojaĝon malgraŭ vivdanĝero kaj malfaciloj por fari inspektadon al la liberigita regiono de Kamboĝo kaj faris koran intervidiĝon kaj vastan kontaktiĝon kun la enlandaj gvidantoj de la Nacia Unueca Fronto kaj la Reĝlanda Registaro de Nacia Unuiĝo kaj armeanoj kaj popolanoj en la liberigita regiono. Ĉie kien la Samdek kaj lia edzino alvenis, ili ricevis varman bonvenigon de la armeanoj kaj popolanoj de la liberigita regiono.

La reveno de Samdek Norodom Sihanuk al Kamboĝo por inspektado fortege kuraĝigis la armeon kaj popolon en la liberigita regiono. Tio estas granda venko en la kontraŭusona naciŝava batalo de la kamboĝa popolo.


Sur la Stung Treng-Phnompenh-a Ŝtata Ŝoseo vojaĝas (en la unua vico de maldekstre) Princino Monique Sihanuk, Sinjoro Khieu Samphan, Samdek Norodom Sihanuk kaj Sinjoro Hu Nim.





La unua kabineta kunveno de la Reĝlanda Registaro de Nacia Unuiĝo de Kamboĝo prezidata de ŝtatestro Samdek Norodom Sihanuk ĉe Angkor

Samdek Norodom Sihanuk estas varme akceptata de junaj batalantoj de la Popolaj Naciliberigaj Armitaj Fortoj de Kamboĝo.





Samdek Norodom Sihanuk kaj aliaj en marŝado

Feliĉa tempo en la hejmlando

ndek Norodom Sihanuk ĉe Angkor.







Samdek Norodom Sihanuk faras paroladon en mitingo proksime de Angkor. Antaŭ la podio flirtas la standardo de la Kamboĝa Reĝlando.

La ĉeestantaj civitanoj aplaŭdas la paroladon de ŝtatestro Samdek Norodom Sihanuk.



Samdek Norodom Sihanuk (*maldekstre*) kaj Sinjoro Khieu Samphan (*meze*), vicĉefministro de la Reĝlanda Registaro de Nacia Unuiĝo de Kamboĝo kaj ĉefkomandanto de la Popolaj Naciliberigaj Armitaj Fortoj






Samdek Norodom Sihanuk kaj aliaj ĉe loko en Truong-Son-montaro.

Maŝinpaŝiloj kaptitaj de batalantoj de la Popolaj Naciliberigaj Armitaj Fortoj de Kamboĝo en novaj uniformoj







Samdek Norodom Sihanuk kunestas kun herooj de la rezista movado en Kambôgo en la Templo de Banteay Srei.


# Disvolviĝo de Scienco kaj Tekniko de Nia Lando

**E**N la pasintaj pli ol 20 jaroj, precipe depost la Granda Proletara Kultura Revolucio, scienco kaj tekniko de nia lando akiris grandan disvolviĝon sub direkto de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

La bazo de scienco kaj tekniko en la malnova Ĉinio estis tre malforta. Antaŭ la naskiĝo de la nova Ĉinio en 1949, la tuta lando havis nur dekojn da specialaj esploraj institucioj kun centoj da

membroj. Tiuj kompatindaj institucioj ne povis facile disvolvi sian sciencan kaj teknikan esploron kaj mankis al ili monrimedoj kaj ekipaĵoj pro agreso de imperiismo kaj putra reĝimo de la kuomintangana reakcia registaro. Kaj ili ĉiuj estis en senespera stato.

Post la Liberiĝo, sekvante la instrukcion de Prezidanto Maŭ **“La popolo de nia lando devas havi perspektivan projekton kaj klopode ŝanĝi la posti-**



*Ĝang Longhiang (la unua de dekstre), profesoro de biokemio de la Pekina Universitato, direktas sciencan grupon en fundamenta teoria studo pri la strukturo de proteino.*

ĝintan staton de niaj ekonomio, scienco kaj kulturo dum kelkdek jaroj”, la Partio kaj registaro ellaboris la projekton pri disvolvo de scienco kaj tekniko. Kaj de tiam niaj scienco kaj tekniko eniris en la novan etapon de rapida disvolviĝo. En la pasintaj pli ol 20 jaroj, nia lando kulturis kaj grandigis la vicojn de sciencistoj kaj teknikistoj kaj malfermis iujn gravajn kampojn de scienca esplorado. La scienca kaj teknika niveloj multe altiĝis, kaj iuj atingoj en scienca esplorado altiĝis aŭ proksimiĝis al la progresinta nivelo de la mondo. En la agrikultura kaj industria produktoj kaj konstruado de la moderna nacidefendo, ni jam povas memstare solvi multajn sciencajn kaj teknikajn problemojn. En disvolvo de sciencaj kaj teknikaj aferoj, niaj kadroj, sciencistoj kaj teknikistoj serioze sekvas la direkton montritan de Prezidanto Maŭ pri servigo de scienco kaj tekniko al la proletara politiko, al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, plenumas la amasan linion, persistas en la proletara principo “sendependeco kaj memstarereco, sinapogo sur la propraj fortoj”, “kune floru cent floroj kaj voĉojn aŭdigu cent skoloj”, kaj gvidas siajn laborojn per dialektika materiismo. Dank’ al tio niaj scienco kaj tekniko ricevis viglan disvolviĝon kaj grandajn sukcesojn.


### AMASA SCIENCA EKSPERIMENTADO

Scienca eksperimento estas unu el tri grandaj revoluciaj movadoj por konstrui la socialisman potencon. Liberigi sciencon kaj teknikon de multaj homoj kaj fari ĝin forta armilo de la laboranta popolo en konstruado de socialismo estas rimarkinda karaktero de la sciencaj kaj teknikaj laboroj de nia lando. Prezidanto Maŭ montris: “La popolamasoj posedas senliman krean povon”, “La pleba estas la plej saĝa dum la aristokrata estas la plej stulta”. Sub direkto de la brila penso de Prezidanto Maŭ, la amasa movado de la sciencaj eksperimentoj, teknika renovigo kaj teknika revolucio disvolviĝas vaste kaj pompe tra la tuta lando.

En la lastaj jaroj, kun efektiviĝo de “La Okpunkta Ĉarto por Agrikulturo” kiel la centro en la scienca eksperimentado de agrikulturo, en la vasta kamparo ĝenerale stariĝis organizoj de la agrikulturaj eksperimentoj kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kiel ĉefaj fortoj. Kaj formiĝis agrikultura trupo de scienco kaj tekniko. En la urboj Ŝanhajo, Pekino kaj Tiangin kaj la

provincoj Ĝegiang, Guangdong k.a. tre viglas la amasa scienca kaj teknika aktivadoj. En Guangdong, pli ol 1,300,000 personoj partoprenas en la agronomia eksperimento, kaj en la jaro 1971 ili esploris pli ol 2,000 sciencajn objektojn, el kiuj pli ol 300 ricevis kompare bonan sukceson. En Hin-hian-regiono de Ŝanhi-provinco, oni jam solvis iujn teknikajn malfacilojn en kulturado de hibridaj plan-

*Alte preciza vakua normiga pesilo projektita kaj farita de la Ŝanhaja Fabriko de Pesiloj kaj Aliaj Instrumentoj povas kontroli alte precizan pezilon pro tio ke aero ne povas ĝin erarigi.*



toj kaj malfermis novan vojon por altigi agrikulturan produktadon en tiu loko. Depost la kultura revolucio, komenciĝis sciencaj eksperimentoj pri aplikado de mikroboj al agrikulturo. En la vasta kamparo oni starigis milojn kaj milojn da simplaj fabrikoj de bakteria sterko kaj mikroba insekticido, tio bone akcelas disvolviĝon de la agrikultura produkto.

Ankaŭ en la industria fronto, amasa movado de teknika renovigo kaj teknika revolucio rapide disvolviĝas, grandnombre aperas novaj produktaĵoj, materialoj, tekniko kaj teknologio. En 1971, la Anŝan-a Fer-ŝtala Kompanio produktis pli ol 350 novajn specojn de ŝtalaĵoj, kiuj plenigis iujn mankojn de ŝtalaĵoj de nia lando. En multaj urboj leviĝis la amasa movado de apliko kaj plivastigo de elektrona tekniko kaj atingis grandan sukceson. En 1970, la produktokvanto de transistoraj materialoj en Ŝanhajo superis la totalon de tiu de la lastaj dek jaroj kaj la specoj de transistoroj pliiĝis kelkdek-oble kompare kun tiuj de 1965. Nun Ŝanhajo jam plivastigis preskaŭ mil objek-

tojn da elektrona tekniko en aplikado. Tio ludas grandan rolon en plibonigo de kvalito de produktaĵoj, plialtigo de aŭtomatiga kaj duonaŭtomatiga nivelo de produktado, reduktado de konsumo de krudaĵoj, materialoj kaj elektro kaj plibonigo de laborkondiĉoj.

La grundo-malleviĝo de marbordaj urboj estas grava scienca problemo longe ne solvita. Laboristoj kaj teknikistoj de la Ŝanhaja Urbokonstrua Administracio kaj la Ŝanhaja Akvokonduka Kompanio trovis en produktado ĉefan kaŭzon de grundo-malleviĝo de Ŝanhajo, ke oni grandkvante konsumas subteran akvon, tial ili adoptas metodon enpumpi akvon por ĉesigi la grundo-malleviĝon. De la jaro 1967, dank' al tio la grundo de Ŝanhajo ne nur ĉesis malleviĝi, sed eĉ iom leviĝis.

En la amasa scienca eksperimentado aperis multaj sciencistoj, inventistoj kaj lertuloj en la teknika renovigo, devenintaj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Iliaj invento kaj kreo multe antaŭenpuŝas nian socialisman konstruadon.

*Jaŭ Ŝiĉang (la tria de dekstre) resumas sperton de riĉa rikolto de arakido kune kun kadroj kaj komunumanoj.*




## SCIENCO KAJ TEKNIKO SERVAS AL LA SOCIALISMA REVOLUCIO KAJ KONSTRUADO

Servo al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj strikta kombiniĝo kun la produkta praktiko estas grava principo de nia lando por rapidigi disvolviĝon de scienco kaj tekniko.

Post la Liberiĝo, laŭ la bezono de ŝtata konstruado, sciencistoj kaj teknikistoj de nia lando faris multflankajn sintezajn esplorojn kaj enketojn de riĉfontoj kaj trovis riĉajn minaĵojn ekspluateblajn. Ekzemple, la petrolo uzata de nia lando estis importita antaŭ la Liberiĝo. Post la Liberiĝo, dank' al la grandskala prospektorado, ni trovis abundajn fontojn de petrolo en nia lando. Bankrotis la absurda aserto, ke "Ĉinio estas malriĉa je petrolo". En la praktiko, niaj sciencistoj resumis kaj progresigis nian teorion pri la petrola geologio, kaj produktaĵoj de petrolo tute kontentigas la bezonon de nia lando.

La sismologia laboro disvolviĝas ankaŭ tre rapide. Nia lando estas sismoza. Antaŭ la Liberiĝo ni havis nur unu sismologian stacion kun tri laborantoj. Tiam oni nenion faris en sisma esplorado. Post la Liberiĝo, sub zorgo de la Partio formiĝis vicoj de sismologoj kun partopreno de amasoj kaj fondiĝis sismologiaj stacioj en diversaj lokoj de la tuta lando. Ili diligente okupiĝas pri la observado kaj esplorado por protekti ekonomian konstruadon kaj sekurigi la popolon. En la sismologia esplorado aperis nova prospero.


En servigo de scienco kaj tekniko al la socialisma konstruado, ni persistas en la principo de sendependeco kaj sinapogo sur propraj fortoj, kaj iras nian propran vojon en disvolvo de scienco kaj tekniko, kombinante ĉerpon de alilandaj progresintaj spertoj kun niaj kreivaj esploroj. Ni mem projektis kaj konstruis la Nankinan Jangzi-pontegon. En konstruado de la fervoja kaj ŝosea partoj kun longeco de kelkaj kilometroj, troviĝis multaj sciencaj kaj teknikaj malfaciloj, kiel preciza



*Laborantoj de la Stepo-esplora Instituto de Hilinguole-ligo de la Interna Mongolio analizas la nutraĵojn de herboj.*

lokigo de mergkestego, enverŝo de betono sub akvo, profunda subakviĝo kaj produkto de tutpecaj antaŭstreĉitaj traboj, kiuj estas solvitaj per la saĝo kaj fortoj de la laborista klaso. En la jaro 1968, laboristoj kaj teknikistoj de nia lando fabrikis, per 150 tagoj, 125,000-kilovatan generatoron kun interne farita duobla akva malvarmigo, post la sukcesa fabriko de 12,500-kilovata generatoro en 1958, la unua en la mondo.

En la praktikado, la medicina scienco de nia lando elhakis novan vojon. Sekvante la instrukcion de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ "La medicino kaj farmacio de Ĉinio estas granda trezorejo. Oni devas klopodi por esplori ilin kaj levi ilin al pli alta nivelo", ni heredas medicinon kaj farmacion kaj akiris ĝojindajn sukcesojn en kombino de la ĉina medicino kun la okcidenta. La vasta apliko de akupunktura anestezo en operacio, kuraco de grandarea brulvundo, rekunigo de rompitaĵoj, resanigo de surdmutuloj k.a. estas iniciatoj en la medicina historio.



*La Akupunktura Anesteza Grupo de la Tuberkuloza Instituto de Pekino faras esploron pri la aplikado de akupunktura anestezo por altigi la bonecon de operacioj.*

En sinteza utiligo de uzitaj industriaĵoj, gaso kaj skorio, ni ankaŭ unuapaŝe akiris rimarkindan sukceson. En kapitalismaj landoj la publika veneno de tiuj uzitaĵoj fariĝis granda malfacile solvbla problemo en socio. Sed en nia lando la Partio kaj registaro ĉiam zorgas pri sano de la laboranta popolo kaj postulas turni tiujn venenajn kaj uzitajn objektojn en utilajn per scienca metodo.

Sub la gvido de la Partio, la kombiniĝo de sciencistoj, teknikistoj kaj kadroj kun laboristoj kaj kamparanoj estas bona formo por disvolvi produkton, sciencan kaj teknikon. Ĝeng Dajju, inĝeniero de la Anŝan-a Elektra Administracio, kune kun laboristoj kreis novan teknikon de libera la-

borado sur altensia linio kun 220,000 voltoj. Matematikistoj de nia lando disvastigis rapidan metodon de serĉado de plej bona plano en la industria produkto kaj aliaj entreprenoj kaj ricevis rimarkindan efikon, persistante en kombino de teorio kun praktiko kaj irante la vojon de kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj.

## DISVOLVIĜO DE AVANGARDA TEKNIKO DE ĈINIO

Sub gvido de la Partio kaj Prezidanto Maŭ avangarda tekniko disvolviĝas rapide. En la nuklea provado, la tuta mondo scias, ke nia lando faris limigitajn provojn tute por nin defendi. Sin apogante sur la propraj fortoj kaj peneme luktante en malfaciloj, la laboristoj, sciencistoj kaj teknikistoj sukcese eksplodigis nian unuan atombombon en la 16-a de oktobro, 1964 kaj nian unuan hidrogenbombon en la 17-a de junio, 1967. De la unua atombombo ĝis la unua hidrogenbombo, ni uzis tempon de nur du jaroj kaj ok monatoj. La sukcesa nuklea provo de nia lando peze batis la politikon de nuklea monopolo kaj ĉantaĝo de la du superpotencoj kaj kuraĝigis subprematajn popolojn de diversaj landoj en revolucia batalo.

Respondante al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ "Ni ankaŭ devas fari artefaritan tersateliton", nia lando lanĉis nian unuan artefaritan tersateliton en la 24-a de aprilo 1970. Tio markis novan nivelon de scienco kaj tekniko de nia lando. De eksplodigo de la unua atombombo ĝis sukcesa lanĉo de la unua tersatelito, ni uzis nur tempon de 5 jaroj kaj duono. La satelito pezas 173 kg. Nun la dua artefarita tersatelito de nia lando rondiras ankoraŭ regule.

En disvolviĝo de avangarda tekniko, krom la atomenergia industrio kaj tekniko de misilo kaj kosma spaco, jetantaŭenpela, radioelektrona, lasera, transistora kaj komputa tekniko, aŭtomata manipulado kaj polimera kemio k.a. akiris rimarkindajn progresojn surbaze de nulo. Ankaŭ 10,000-tonelan ŝipon kaj altrapidan jeton ni jam povas mem fabriki.

## ATINGOJ EN STUDIO DE LA BAZA TEORIO


Sub direkto de la filozofia penso de Prezidanto Maŭ aperis ĝojindaj atingoj en studo de la baza teorio.

En studo de la vivgenezo la sciencaj laborantoj de nia lando unuafoje akiris sukceson en sintezado de bovinsulino en la jaro 1965. Tio faris grandan paŝon antaŭen sur la vojo al malfermo de vivsekreto kaj donis fidindajn sciencajn argumentojn por dialektika materiismo. En la Granda Proletara Kultura Revolucio nia lando sukcese finis mezuradon de kristala strukturo de porkinsulino per difrakto de iks-radioj kun distinga povo de 2.5 anstromoj (unu anstromo = 1/100,000,000 de centimetro).

Nia lando ankoraŭ faris grandskalajn kaj multflankajn sciencajn esplorojn en la regiono Ĝolmolangma kaj akiris multajn kompletajn kaj valorajn materialojn por studi la geologian historion kaj vivaĵevoluo de la firsto de la mondo. Tiuj mate-

rialoj neis iujn erarajn konkludojn pri la regiono faritajn en la pasinteco kaj kreis favorajn kondiĉojn por ekspluati la naturajn riĉfontojn de Tibeto en la estonteco.

Novajn atingojn ni akiris ankaŭ en arkeologio kaj astronomio. En 1965 malkovriĝis simihoma parietalo en Lantian de Ŝenhi-provinco kaj mandiblo de Ĝoŭkoŭdian-a simihomo, kio donis al ni gravajn materialojn por studi homan genezon. En la jaro 1968, la astronomiaj laborantoj de nia lando faris grandskalan sintezan observadon al plena suna eklipso en Hingiang-regiono kaj akiris gravajn materialojn pri suna fiziko. En 1972, elfosiĝis Mavangduj-tombo n-ro 1 en antaŭurbo de Ĉangŝa. Ĝi donis al ni riĉajn atestaĵojn por plue koni iujn karakterizaĵojn de feŭda socio de nia lando.



*En la urbo Ljuda de Liaŭning-provinco vaste disvolviĝas amasa aktivado de teknika renovigo. Jen oni demonstras la funkcion de nova metaltranĉilo.*

# Antaŭe kaj Nuntempe

## —Paroloj de Tri Sciencistoj


*Antaŭ nelonge ni petis tri ĉinajn sciencistojn iom paroli al niaj legantoj pri siaj vivspertoj. Ili ĉiuj sin okupas pri scienca esplorado je dekoj da jaroj en la malnova kaj nova socioj kaj estas fidoplenaj pri la disvolvado de la sciencaj laboroj de la nova Ĉinio.*

La Red.

**Ŝen Ŝangjong** (vicestro de la Ŝanhaja Instituto de Planta Fiziologio):

Mia studobjekto estas mikrobiologio. En la pasinteco mi studis biokemian genetikon en la Kalifornia Instituto de Teknologio de Usono. En 1950, kun senlima ĝojo kaj deziro dediĉi miajn fortojn al la konstruado de la nova Ĉinio mi revenis

*Ŝen Ŝangjong kaj junaj sciencaj laborantoj en laboratorio*



en la sinon de la patrolando post venko de multaj malfaciloj kaj ricevis varman bonvenigon de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la popola registaro.

En la pasintaj 22 jaroj post mia reveno, mi propraokule vidis, ke la nova Ĉinio sub la saĝa gvido de la Partio kaj Prezidanto Maŭ akiris brilajn sukcesojn en socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. Same kiel la aliaj fakoj, ankaŭ la sciencaj aferoj de nia patrolando disvolviĝas rapide kun ĉiu tago. Ni prenu la Ŝanhajan Instituton de Planta Fiziologio kiel ekzemplon. En la komenca periodo post ĝia fondiĝo, ĝi havis nur iom pli ol 40 homojn, dum nun jam pli ol 360. Krom ĉiaj laboratoriaj instrumentoj kaj riĉa biblioteko, ĝi havas ankaŭ fabrikan de laboratoriaj instrumentoj kaj kultivejon por eksperimentado. Ĉio ĉi tio estis tute neebla sub la reakcia regado de Kuomintang. En la malnova Ĉinio estis nenia bazo de esplorado pri mikrobiologio. Tiam penicilino, streptomicino k.s. ofte uzataj medikamentoj estis tute importitaj. Post la Liberiĝo, sub la direkto de la principo difnita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**sendependeco kaj tenado de iniciativo kaj sinapogo sur la propraj fortoj**”, nia instituto kaj la koncernaj unuoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj rapide starigis kune kun produktaj entreprenoj nian propran industrion de antibiotikoj en relative mallonga tempo. Ekzemple, en la komenco de la kvindekaj jaroj nur Usono povis produkti aŭreomicinon, tamen en 1954 ni jam sukcesis havigi al ni mikroban rason kaj la tutan produktan teknikon de fermentado kaj ekstraktado. Krom gravaj problemoj en produktado, ni aktive studas ankaŭ fundamentan teorion, kiel ekzemple fiziologion kaj genetikon de mikroboj, konforme al la



bezono de la socialisma konstruado kaj la senĉesa disvolviĝo de la scienca esplorado de nia patrolando.


Post la Granda Proletara Kultura Revolucio, ni pli bone komprenas, ke la scienca esplorado de la nova Ĉinio devas servi al la popolo kaj la sciencaj laborantoj nepre devas kombiniĝi kun laboristoj kaj kamparanoj. Nun ni ne nur faras eksperimentojn en laboratorio, sed ankaŭ iras en fabrikojn kaj vilaĝojn por fari esploron kune kun laboristoj kaj kamparanoj. En la lastaj jaroj, ni akiris ĝojindajn sukcesojn en studo pri vegetala fiziologio kaj mikroboj, kaj per tio faris novan kontribuon al la scienca afero de nia patrolando.

En la pasintaj 22 jaroj post mia reveno al la patrolando, la Partio kaj la popola registaro ne nur donis grandan subtenon kaj kuraĝigon al mia laboro, sed ankaŭ multe zorgis min en politiko. Ĉiufoje kiam mi atingis certan sukceson en laboro, la Partio kaj popola registaro donis al mi grandan honoron. Dum tiu periodo, mi dufoje vojaĝis al Eŭropo por ĉeesti internaciajn konferencojn pri biokemio kaj antibiotiko, en kiuj mi prezentis laborojn de niaj sciencaj laboratorioj kaj interŝanĝis spertojn kun sciencistoj de diversaj landoj. Dank' al edukado de la Partio, senĉese altiĝis mia politika konscio, kaj en la jaro 1958, mi glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio.

**Ju Ŝenhan** (inĝeniero kaj vicedestro de la revolucia komitato de la Karbo-instituto de Liaŭning):


Nia lando havas riĉan fonton de karbo en tre vasta tereno. Mi okupiĝas pri studo de sekura produktado de karbominejo je ĉ. 30 jaroj en la malnova kaj nova socioj kaj havas tute malsamajn spertojn pri ili.

Antaŭ la Liberiĝo, pro manko de sekurigaj aranĝoj, ofte okazis akcidentoj kiaj apero de akvo, fajro, gaseksplodo kaj rokfalo kaj la vivo de la ministoj estis tute sen sekurigo. Statistikaj registroj montras, ke pli ol 250,000 ministoj estis vunditaj aŭ mortigitaj en akcidentoj sole en la minejo de Fuŝun dum la periodo de 1916 ĝis 1944. Tamen en la malnova Ĉinio estis neniu scienca instituto speciale zorganta pri sekura produktado de karbominejo. La Minada kaj Metalurgia Instituto starigita de la reacia registaro de Kuomintang ĉe la Tianfu-a Karbominejo de Siĉuan estis nur ia ornamaĵo. Mi restis tie du jarojn kaj vidis propraokule ke la t.n. specialistoj kaj instruituloj faras nenion alian ol laboradi super materialoj en fermita ĉambro.



*Ju Ŝenhan (meze) faras sciencajn eksperimentojn kune kun laboristoj kaj sciencaj laborantoj.*

En 1953, post la fondiĝo de la Karbo-instituto de Fuŝun (nun la Karbo-instituto de Liaŭning) mi eklaboris en ĝi. En la pasintaj 20 jaroj, mi vidis propraokule ke sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, rapide disvolviĝis la scienca esploro pri sekura produktado de karbominejo de la nova Ĉinio kaj sane kreskis sciencaj kaj teknikaj laborantoj. Ni prenu nian instituton kiel ekzemplon. Ĝi disvolviĝis senĉese kaj fariĝis pli kaj pli granda. Nun la plankareo de la konstruaĵoj pligrandiĝis je 13-oblo kompare kun tiu de la komenca periodo, ĝi havas pli ol 3,000 instrumentojn kaj ekipaĵojn kun avangarda nivelo kaj pli ol 300 sciencajn laborantojn, inter kiuj du trionoj estas diplomitoj kaj esploraj studentoj de 24 fakoj el en- kaj ekster-landaj universitatoj. Konforme al la bezono de la scienca esploro, la ŝtato speciale konstruigis domegon por scienca esplorado, fabrikon por eksperimentado ktp. La



aktiveco de la sciencaj kaj teknikaj laborantoj estis plene disvolvitaĵoj. En la lastaj du jaroj, el la 35 gravaj esploraj temoj, 15 ricevis sukcesojn kaj 10 ricevis gravan progreson, kio faris kontribuon al la sekura produktado de karbominejo.

En la pasintaj 20 jaroj, en la scienca esplora laboro pri sekura produktado de karbominejo, ne nur nova generacio de laborantoj kreskas rapide, sed ankaŭ la sciencaj laborantoj el la malnova socio rejuniĝis kaj progresas rapide. Dank' al la edukado kaj kulturado de la Partio mi mem senĉese altiĝis en politika konscio kaj scienca laboro. De multaj jaroj mi okupiĝis kune kun novaj kaj malnovaj sciencaj kaj teknikaj laborantoj pri esplorado de gaso. Post longa praktikado de scienca esplorado, ni fundamente konis la naturon de gaso kaj mastris la leĝon por ĝin regi. Ekzemple, ni jam sukcesis jungi la gason de la Fuŝun-a Karbominejo kaj turnas ĝin en karbon-nigran kaj aliajn materialojn por kemia industrio kaj hejtajlon.

Mia scienca esplora laboro de tridek jaroj profunde konigis al mi, ke la nova Ĉinio malfermis vastan perspektivon por la disvolviĝo de sciencaj esploroj. Ĉiuj sciencaj laborantoj, kiuj amas la novan Ĉinion kaj volas dediĉi sian forton al la socialisma konstruado, povas ricevi konfidon kaj zorgon de la Partio kaj la popolo.

**Ŝeng Tongŝeng** (esploranto de la Veterinara Instituto de Langŝou):

Antaŭ la Liberiĝo, mi partoprenis kune kun multaj geamikoj okupiĝantaj pri sciencaj kaj teknikaj laboroj aktivadon de la Ĉina Societo de Naturaj Sciencoj, unu el la ĉefaj sciencaj societoj de nia lando, sed tre malgrandan sukceson mi akiris per la diligenta laborado de pli ol 20 jaroj. Vere malfacile estis fari sciencajn esplorojn en la malnova Ĉinio!

En 1946, mi venis al Langŝou por starigi la unuan veterinaran instituton de Ĉinio. Kvankam brutobredado okupis gravan lokon en la nacia ekonomio, tamen pro tio, ke la kuomintanga reaktiva registaro tute ignoris la edukadon de laborantoj, tri jarojn post sia fondiĝo, t.e. je la Liberiĝo en 1949, la lernejo okupis nur areon de malpli ol 40 muoj kaj la plankareo de la konstruaĵoj estis nur iom pli ol 3,000 kvadrataj metroj, ĝi havis nur iom pli ol cent instruistojn kaj studentojn kaj suferis de akraj malfacilaĵoj en financo kaj ekstrema manko de ekipaĵoj.

Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ, la esplora laboro de brutobredado ricevis novan vivon. Sub la zorgo de la popola registaro, nia lernejo baldaŭ estis grandigita kaj fariĝis agronomia universitato. La ŝtato asignis al ĝi centojn da hektaroj da tero, konstruigis por ĝi pluretaĝajn domojn kun plank-

areo de centoj da miloj da kvadrataj metroj, aldonis al ĝi grandan kvanton da libroj kaj instrumentoj kaj la nombro de ĝiaj studentoj pliiĝis ĝis pli ol mil. En la pasintaj pli ol 20 jaroj, ĝi kulturis grandan nombron da veterinaroj por la ŝtato kaj per tio forte stimulis la disvolviĝon de la brutobredado de nordokcidenta Ĉinio. La Veterinara Instituto de Langŝou estas fondita post la Liberiĝo. Ĝi havas relative taŭgajn instrumentojn kaj sufiĉe da animaloj por eksperimento. En la pasintaj dekelkaj jaroj, ĝiaj esploristoj faris multajn kreivajn eksperimentojn kaj akiris nemalmultajn sukcesojn. Sole post la komenco de la Granda Proletara Kultura Revolucio, 11 gravaj sukcesoj estas disvastigitaj.

Antaŭ la Liberiĝo, nur en malmultaj gubernioj kaj urboj de nia lando sin trovis veterinaraj stacioj kaj ili estas plejparte nur nominalaj. Nun ĉiuj popolaj komunumoj kaj eĉ iuj produktaj brigadoj jam havas veterinara stacion kaj arta impregno, rebonigo de raso de brutoj, renovigo de herbejoj, preventado de brutaj malsanoj kaj diversaj amasaj sciencaj eksperimentoj estas vaste praktikataj. Tio rapidigis la disvolviĝon de la brutobredado. Ni prenu Gansu-provincon kiel ekzemplon, la nombro de porkoj de 1970 kreskis je ĉ. 47 % ol tiu de 1969 kaj en la lastaj jaroj ĝi akiris plian altiĝon. Ankaŭ la nombro de aliaj brutoj de la paŝtaj regionoj de Gansu-provinco altiĝis multe, ekzemple en la Aksaja Kazaha Aŭtonoma Gubernio la nombro de diversaj brutoj kreskis je 12-oblo kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. Dank' al la disvolviĝo de produktado, multaj paŝtaj regionoj jam havas traktorojn, generatorojn, tondomaŝinojn, herbofalĉilojn kaj senbuterigilojn. Sekve de la rapida disvolviĝo de brutobredado, pli kaj pli vastiĝis la agadkampo de la laborantoj de brutobreda kaj veterinara sciencoj.

La Partio kaj la popola registaro tre zorgas pri la politika vivo de ni laborantoj de la veterinara scienco. Post la Liberiĝo, mi laboris kiel membro de la Administra Komisiono de la Nordokcidenta Ĉinio kaj vicestro de la Departemento de Brutobredado, akademiano de la Biologia Fakto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, reprezentanto de la Unua Tutlanda Popola Kongreso kaj membro de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsilia Konferenco. Ĉiuj tiuj honoroj donitaj al mi montris la konfidon de la Kompartio kaj popolo al ni intelektuloj. En la pasintaj pli ol 20 jaroj, mi profunde konvinkiĝis, ke nur en la nova Ĉinio la ĉinaj sciencaj kaj teknikaj laborantoj povas bone disvolvi siajn kapablojn kaj fari kontribuojn al la socialisma konstruado.

## KUNMETITAJ ILMAŜINOJ

Rimarkinde altiĝis la produktokvanto kaj teknika nivelo de la fabrikado de kunmetitaj ilmaŝinoj en nia lando. Nun en multaj lokoj de nia lando estas projektitaj kaj fabrikitaj tiaj ilmaŝinoj, kiuj konsistigas pli ol tri kvaronojn de niaj aŭtomataj produktaj linioj. Kunmetita ilmaŝino estas altefika aŭtomata ilmaŝino. Ĝi koncentris la superecojn de specialaj kaj ordinaraj ilmaŝinoj. Per kunmetitaj ilmaŝinoj oni povas fari plurfacetan, pluraksan, plurprocedan kaj plurpozician prilaboron. Ĉar tia maŝino estas farita ĉefe el pogranda produktitaj universalaj partoj, tial la projektado kaj produktado bezonas malpli multe da tempo, kaj tia maŝino kostas malpli multe da mono kaj estas pli facile riparebla.

## LA PROGRESO DE MEZURA LABORO

La mezura laboro de nia lando havas longan historion. Post la Liberiĝo de nia lando en 1949, ĝi multe progresis en industria produktado kaj scienca esplorado. Precipe post kiam la registaro per ordono difinis en 1959 la mezuran sistemon laŭ la internacia sistemo, la laboroj pri mezurado ricevis plian antaŭenpuŝon. Nun, la mezuraj sistemoj de nia lando estas fundamente unuecaj kaj jam stariĝis pli ol 80 specoj de mezuraj normoj de longeco, varmeco, mekaniko, elektromagnetismo, optiko, akustiko, radioaktiveco, tempo kaj frekvenco kaj fizikokemio. Krome, oni ankaŭ mem projektis kaj faris nombron da precizegaj normaj mezuraj instrumentoj de avangarda nivelo. Jam unuapaŝe formiĝis mezuril-kontrola reto kaj diversaj mezuroj iom post iom ekzaktiĝis kaj unueciĝis.

# Nova Kontribuo de Maljuna Sciencisto



*Kamarado Hua Luogeng*

**P**ROFESORO Hua Luogeng estas fama matematikisto kaj akademiano de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Li aĝas 63 jarojn kaj apartenas al la maljuna generacio de sciencistoj de Ĉinio. Ekde la aĝo de 20 jaroj, li komencis lekcii en Kinghua-a Universitato kaj poste en Eŭropo kaj Ameriko. Li revenis al sia patrolando en la jaro 1950. Dum la pasintaj pli ol 20 jaroj li multe kontribuis en matematika teoria esplorado kaj instruado kaj skribis multajn verkojn kiaj estas “Aditiva Teorio pri Primaj Nombroj”, “Harmoniaj Analizoj pri Funkcioj de Pluraj Kompleksaj Variantoj en la Klasikaj Regnoĵ”. En la jaro 1958 kiam estis prove efektiva “linia programado” en industrio kaj transporta administrado, Hua Luogeng partoprenis en tia laboro observante la instrukcion de Prezidanto Maŭ pri kombiniĝo de intelektuloj kun la laboristoj kaj kamparanoj kaj aplikis en ili siajn atingojn en esplorado pri operaciado. Tio estis lia unua provo de partopreno de amasa scienca eksperimentado. Dum sia profundiĝo en produktado kun junaj matematikistoj sub sia gvido en 1964, li verkis “Simplan Kurson pri Tutec-planada Metodo”, kiu klare prezentas matematikan metodon por altigi produktivecon, kaj poste libron “Rapida Metodo de Serĉado de Plej Bona Plano” en la Granda Proletara Kultura Revolucio.

La rapida metodo de serĉado de la plej bona plano estas matematika metodo, per kiu oni povas plej rapide trovi la plej bonan planon bezonatan

por produktado, konstruado kaj scienca eksperimentado. Dank’ al tia plano, oni povas pliigi la produktokvanton kaj plibonigi la kvaliton de produktaĵoj kaj malpliigi la konsumon de krudaj materialoj. Antaŭe por akiri tian planon oni devis eksperimenti fojerefoje en permesita sfero. Tamen ofte post multaj eksperimentoj kaj forkonsumo de multe da tempo kaj materialoj oni akiris nenian sukceson. Sed la nova metodo jam ne havas tiajn mankojn kaj povas esti vaste uzata en serĉado de taŭgaj recepto, cifero, temperaturo, tempo kaj premforto. La nova metodo ebligas al ni ŝpari grandkvante homfortojn, materialojn kaj tempon, kaj konformas al la principo “multe, rapide, bone kaj ekonomie”.

En la lastaj du jaroj kamarado Hua Luogeng sinsekve iris al la urboj Ŝanhajo, Pekino, Tiangin kaj la provincoj Guangdong, Gansu, Hubej, Fugian, Liaŭning, Hejlonggiang kaj Gilin por plivastigi la metodon. Dank’ al subteno de diversnivelaĵ gvidantoj kaj penado de laboristoj kaj teknikistoj, rimarkindaj sukcesoj estis akiritaj en produktado kaj scienca eksperimentado post kiam ĝi estis vaste adoptita en multaj fabrikoj, minejoj kaj aliaj entreprenoj.

La nova metodo jam estas relative vaste aplikata en Liaŭning, kies fabrikoj, minejoj kaj scienc-esploraj institucioj jam ricevis bonajn rezultojn en pli ol 14,000 objektoj. En la pasinteco la Sesa Fabriko de Medikamentoj de la Nordoriento en Ŝenjang

produktis specon de sulfamido kun malalta procento de bonkvalitaj produktaĵoj. En la unua duonjaro de 1972 ĝi devis produkti 8 tunojn da tia medikamento laŭ la tasko asignita de la ŝtato, sed ĝi anstataŭigis la antaŭan materialon per nova, eltrovis taŭgan temperaturon per la metodo kaj ĝi sukcesis produkti 8 tunojn da tia medikamento en 12 tagoj. Dank' al uzo de la metodo la fabriko jam ŝparis materialojn kun valoro de pli ol 90,000 juanoj en farado de 14 specoj de medikamentoj.

Kiam kamarado Hua Luogeng estis plivastiganta la metodon en Liaŭning, unuflanke li donis lekcion, aliflanke li lernis de laboristoj kaj aŭskultis iliajn opiniojn pri sia raporto. Kiam li laboris en Anŝan, foje li venis en laborejon de iu fabriko post la dudeka horo spite de pluvego kaj interparolis kun laboristoj manipulantaj ilmaŝinojn por lerni de ili novajn spertojn en apliko de la rapida metodo de serĉado de la plej bona plano. Vang Ĉonglun, fame konata labormodelo de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio, laŭdis: "Ni laboristoj bonvenigas tiajn intelektulojn kaj profesorojn kia vi estas."

En la pasintaj kelkaj jaroj kamarado Hua Luogeng multon spertis en kombiniĝo kun laboristoj

kaj kamparanoj. Li diris: "Mi estas homo veninta el la malnova socio kaj longtempe mi okupis min nur pri scienca esplorado kaj komprenis malmulton pri la revolucio. Nur post kiam mi iom studis Marksismon kaj verkojn de Prezidanto Maŭ, mi ekkomprenis, ke ni intelektuloj devas ĝuste solvi la problemon al kiu servi, kaj ke ni devas nin kombini kun laboristoj kaj kamparanoj. De tiam mi prove eliris el la klasĉambro kaj mia kabineto. Mi populare klarigis iujn el miaj scioj al la laboranta popolo. Kiam mi diskonigis la metodon en Ŝanhajo kaj Liaŭning dum la lastaj du jaroj, pli ol miliono da personoj aŭskultis miajn lekciojn. Reveninte al sia laborposteno ili tuj aplikis la akiritajn sciojn en produktado por grandigi la produktan kvanton kaj plibonigi la kvaliton de produktaĵoj. Mi tre ĝojas ke mi havas la honoron por persone partopreni tiom grandskalan amasan sciencan aktivadon kaj ricevis profundan edukon vidante ke la laboristoj strikte ligas la teorion kun la praktiko."

Kamarado Hua Luogeng diris, ke li nur faris la unuan paŝon sur la vojo de kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj kaj ke li pli firme marŝos antaŭen laŭ la vojo montrita de Prezidanto Maŭ en servado al la popolo.

*Kamarado Hua Luogeng klarigas la rapidan metodon de serĉado de la plej bona plano al fame konataj labormodeloj de Hejlonggiang.*



# Vizito al la Agronomia Instituto de Hinhiang-regiono

**A**NTAŬ nelonge, mi vizitis la Agronomian Instituton de Hinhiang-regiono de Henan-provinco. Ĝi situas en la vilaĝo Sanhiaŭjing je pli ol 20 km. fore de la urbo Hinhiang. Kamaradoj de la instituto varme prezentis al mi sian laboron.

## EN LA KOMENCO

La instituto estas formita surbaze de du kulturejoj ĉe la sojlo de la venko de la Liberiga Milito tra nia tuta lando en 1949.

En la pasintaj pli ol 20 jaroj, la instituto plurfoje ŝanĝis sian nomon kaj sidlokon, tamen neniam sian vojon persisti en servo al la agrikultura produktado kaj al la laboristoj kaj kamparanoj.

En la komenco de sia fondiĝo, la instituto troviĝis en malfacilaj kondiĉoj. Mankis al ili tiam laboratorioj kaj sciencaj instrumentoj. Krom linoj kaj pesiloj ili havis nur ŝprucigilojn militkapitajn.

Sed, por disvolvi agrikulturan produktadon kaj subteni la Liberigan Militon, la sciencaj laborantoj kaj junaj laboristoj ofte iris kun tornistro inter kamparanojn, ĉu en frosta vintro aŭ en varma somero, por fari tie enketadon kaj selekti bonajn speciojn de agrikulturaj plantoj. La specioj de tritiko "Joŭzi", milio "811", kotono "Sizi" kaj batato "Venko-100" selektitaj de ili kreskis je 20-30% ol tiuj lokaj kaj ricevis bonvenigon de la amasoj.

Tiutempe, furiozis malutilaj insektoj en iuj lokoj, precipe afidoj al la kotono "Sizi". Sed la kamparanoj senspertaj kaj superstiĉaj rigardis la afidojn diaj insektoj neekstermeblaj. La sciencaj laborantoj faris propagandon por forigi la super-

stiĉon de la amasoj kaj instruis al ili scion pri flegado de kotonplantoj, kaj samtempe ili persone ekstermis finsektojn per ŝprucigiloj kun tabaka maceraĵo (pro manko de insekticido). Dank' al tio la kamparanoj iom post iom konvinkiĝis pri la scienco.

## PRENI LA AMASOJN KIEL INSTRUISTOJN

En la jaro 1950 tiu ĉi instituto translokiĝis en la vilaĝon Sanhiaŭjing de Hujhian-gubernio. Ili konstruis laboratorion, kabineton, dormĉambrojn kaj konservejon, aĉetis iom da sciencaj instrumentoj kaj kulturis 688 muojn da agroj por eksperimentado. Ili komencis diligente studi la teorion pri agrikultura scienco kaj faris sciencajn eksperimentadon en la instituto.

Poste, ili konis ke nur la teorio ne povas solvi problemon kaj la ŝlosilo estas praktiko. **"La amasoj estas veraj herooj"**, oni nepre devas modeste lerni de ili. Sekve de tio ĝiaj gvidantoj elmetis sloganon "amikiĝi kun kamparanoj" kaj emfazis ke sciencaj laborantoj devas modeste preni kamparanajn labormodelojn kiel siajn instruistojn. Ili invitis veteranajn kamparanojn al sia instituto kaj serioze lernis de ili de semado ĝis rikolto. Per tio ili iom post iom akiris praktikan sperton.

La instituto ankaŭ sendis siajn laborantojn al Ĝang Tuŝu, la tutlanda labormodelo de mili-kulturado, por lernado. En kuna vivado kaj laborado Ĝang Tuŝu ne nur instruis al ili sian tutan sperton pri kulturado de milio, sed ankaŭ faris al ili klasan edukon per sia dolorplena familia historio. Retrorigardante pri tio, kamarado Ĝang


Ljupeng, respondeculo de la instituto diris: “Tiu lernado estas bona eduko kaj metis bazon por mia posta scienca esplorado.”

Profunda enketado estas ankaŭ ĉefa vojo por akiri praktikan sperton. Sub la gvido de la Partio, kun la glora tradicio de militaj jaroj, la enketa grupo konsistigita el sciencaj laborantoj vizitis milion da vilaĝoj de pli ol 20 gubernioj en la norda Henan por fari enketadon. En kelkaj jaroj ili resumis kaj disvastigis pli ol 40 progresemajn spertojn, kolektis multajn bonajn speciojn kulturitajn de kamparanoj, sisteme enketis kulturareon de diversaj agrikulturaj plantoj, grundan strukturon, malsanojn kaj fiinsektojn malutilajn al la plantoj en tiu regiono, kio metis bonan bazon por fari sciencon esploran.

### RESUMO KAJ DISVASTIGO DE SPERTOJ DE LA AMASOJ

Rilate al la sukcesoj akiritaj de tiu instituto, sekretario Guo modeste diris: “Ni atingis malmultan sukceson, nur resumis kaj disvastigis praktikajn spertojn de la amasoj, sekvante la instruojn de Prezidanto Maŭ kaj persistante en servo al la agrikultura produktado kaj en kombiniĝo kun

malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.” La fakto ĝuste estas tia, ke diversaj problemoj en agrikultura produktado ankaŭ estas objektoj esplorataj de la instituto. Tritiko estas unu el la ĉefaj plantoj en Hinhiang-regiono. Antaŭ kelkaj jaroj, en iuj altproduktivaj lokoj de la regiono aperis malstabila fenomeno de produkta kvanto. La instituto prenis la fenomenon kiel urĝe solvendan problemon ne nur por firmigi tritikan produktokvanton de tiuj lokoj, sed ankaŭ por altigi pomuan produktokvanton de tritiko en la tuta regiono. Ili organizis enketan grupon kaj profunde iris en 18 produktajn brigadojn de 4 gubernioj kaj faris detalan enketadon pri produktado de tritiko. Post analizado kaj studado kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, ili trovis la ĉefan kaŭzon de malstabiligo de la tritika produktokvanto: Organika sterko en tritikaj kampoj reduktiĝis dum nitrogena sterko pli multiĝis kaj malkonvena estas la flegado. Poste ili elmetis konvenajn sciencajn rimedojn. Pere de praktiko kaj observado ili unuapaŝe posedis kulturitan kaj flegan teknikon de la altproduktiva tritiko en disbranĉigo, reverdiĝo, tigolongiĝo, florado kaj grajniĝo, kaj resumis sperton pri alta kaj stabila produkto. Dank’ al disvastigo de tiu sperto, la tritika pomua produktokvanto de Hjuliang-komu-



*Vizito al maljuna komunumano Ŝi Ĉuanli*

numo, Bo-aj-gubernio, atingis 384.5 kg., de iuj brigadoj 400 kg. kaj de iuj produktaj grupoj 450 kg. en la jaro 1972.

Tie plantita batato ĝenerale suferis de rusto. Foje iu kamarado de la instituto rimarkis en Sanjang-brigado de Vuĝi-gubernio ke 80% de la batato konservata de iu komunumano putriĝis pro la malsano. Amasoj diris: "Oni povas facile gajni riĉan rikolton de batato, sed malbona konservado perdis ĝian duonon!" Tiu kamarado tuj proponis al la instituto esplori preventadon de la rusto kun la brigado kiel baza loko. La gvidantoj de la instituto aprobis tiun proponon kaj starigis esploran grupon el sciencaj laborantoj, lokaj kadroj kaj veteranaj kamparanoj por esplori la kaŭzon de tiu malsano. Kun helpo de alilokaj spertoj, ili reduktis la malsanon ĝis 0.49% per granda kaj alttemperatura kelo. La ŝtato filmis tiun rimedon kaj ĝin rapide disvastigis en la vasta kamparo.

En la gubernioj Vuĝi, Juanjang kaj Fengkju de Hinhiang-regiono sin trovis grandarea salalkala tero, sur kiu kreskis pasinte nek arboj nek herboj, por ne paroli pri kulturado de grenaj plantoj. Por ŝanĝi tiun staton, la instituto donis grandan atenton al tio kaj starigis tie esploran bazlok. Post la enketado kaj studado kune faritaj de sciencaj laborantoj, lokaj kadroj kaj kamparanoj en

*Scienca laboranto kaj komunumanoj ekzamenas kotonplantojn.*



la lastaj jaroj, tiu ĉi grupo resumis bonan sperton pri reformo de salalkala tero per putakva kaj riverakva irigacioj kaj kulturado de rizplantoj kaj sterkaj plantoj, kaj tiel ŝanĝis multan salalkalan teron en rizkampojn. Laŭ statistiko, 70,000 muoj da tiaj rizkampoj de la gubernioj Fengkju, Juanjang kaj Vuĝi pomue produktis 215 kg. Juanvukomunumo de Juanjang-gubernio devis konsumi en la pasinteco grenon provizatan de la ŝtato pro malfekundeco de salalkala tero, sed en la lastaj du jaroj, ĝi ĉiujare liveras al la ŝtato pli ol 500,000 kg. da superflua greno. La komunumanoj ĝoje diris: "Rizplantoj aromas sur la pasintaj salalkalaj kampoj, kaj la grenmanka loko fariĝis superflua."

### SUKCESOJ SENĈESE AKIRITAJ

En la ekspezoj de la instituto, mi vidis la fruktojn akiritajn de ili per diligenta laborado: Post sia fondiĝo, la instituto plenumis 221 objektojn de scienca esplorado, el kiuj iuj estis publikigitaj per libroj kaj aliaj filmigitaj por pli vasta apliko. Krome, ĝi trejnigis pli ol 10,000 kamparanajn teknikistojn nedisigitajn de agrikultura produktado.


Tie ankoraŭ prezentigis la de ili selektitaj bonaj specioj de diversaj plantoj. Iu maiza bona specio portas jenan klarigon:

*Maizo "Hindan-1" estis selektita en 1962, konfirmita en 1963 kiel bona specio, prove kulturita en 1964 kaj varme akceptata de la amasoj, kulturita demonstre en 26 lokoj en 1965 kun pomua produkto de 397.4 kg., kaj pli vaste kulturita sur 18,000 muoj da kampoj en 1966, el kiuj 290 muoj pomue produktis pli ol 500 kg.*

Kamaradoj de tiu instituto diris, ke la areo pri-semita per hibridigitaj maizaj bonaj specioj okupas 90% de la tuta maiza areo en la regiono, el kiu la maizo "Hindan-1" okupas 60%. Krome, oni ankoraŭ povas vidi ĉi tie bonajn kotonajn speciojn kun pomua produktokvanto de pli ol 100 kg. da sensemigita kotonaj kaj bonajn tritikajn speciojn kun pomua produktokvanto de 350 ĝis 500 kg.

En la pasintaj pli ol 10 jaroj, 48 el la bonaj specioj selektitaj de tiu instituto estis grandaree plantitaj, iuj el ili estis transplantitaj ankaŭ en aliaj provincoj. La disvastigo de la bonaj specioj senĉese plibonigis ĉefajn plantojn kulturatajn en Hinhiang-regiono kaj akcelis la disvolviĝon de ĝia agrikultura produktado.





*Gvidanto, sciencaj laborantoj kaj komunumanoj kune iras al kamparo.*

*Albanaj gekamaradoj priirigardas riĉrikoltan kampon de transplantitaj maizoj.*



# Juna Laboristo-Teknikisto

## Jaŭ Ginĝong

ULTRASONO sin ĵetas al metala tubo rapidege rotacianta por trovi difekton en ĝia interno. La verda lumondo saltadas sur la fluoreskoekrano, kaj la aparato funkcias normale. Subite brilas ruĝa lampo, alarmas sonorilo kaj rapide svingiĝas nadlo, kiu montras eltrovon de krevajo sur la tubo. La krevajo, malpli dika ol haro kaj ape-naŭ videbla por okuloj, longas je tridek mikronoj.

La aparato estas preciza ultrasona difekto-detektilo farita de la Ŝantoŭ-a Ultrasona Elektron-aparata Fabriko de Guangdong-provinco en nia lando. Nun tiu difekt-detektilo jam ludas bonan rolon por garantii kvaliton de inĝenierado en koncerna produktado kaj konstruado. Ĉefa projektanto de tiu preciza aparato estas juna laboristoteknikisto Jaŭ Ginĝong.

En 1956, antaŭ ol sia diplomiĝo el malsupera mezlernejo, Jaŭ Ginĝong venis al la radio-aparata riparejo, kiu poste disvolviĝis en la Ŝantoŭ-an Ultrasonan Elektron-aparatan Fabrikon, por lerni riparadon de radio-aparatoj.

Kiel multaj aliaj junuloj kreskantaj en la nova Ĉinio, li estas plena de idealo pri estonteco. Kiel ĝoja li estis kiam Prezidanto Maŭ faris alvokon al la tutlanda popolo pri marŝo al scienco kaj tekniko, kaj tiam li decidis kontribui sian forton por la disvolvo de la radia afero de la patrolando.

Nia radia afero estis relative postĝinta en la kvindekaj jaroj. Plejparto el radio-aparatoj ĉiutage riparataj de Eta Jaŭ estis produktitaj de fremdaj landoj. Tial lia unua idealo estis kiel eble plej rapide mastri teknikon por fabriki niajn radio-aparatojn. Konsiderante lian mankon de klereco kaj sperto, gvidantoj de la fabriko postulis, ke li lernu komence de splisaĵo-luto. Eta Jaŭ tre diligente studadis. Tage li humile lernis de veteranaj laboristoj kaj vespere li cerbumis en sia hejmo antaŭ iuj akcesoraĵoj. Post trijara diligenta lernado li fariĝis lerta riparisto de radio-aparatoj. En 1958 li partoprenis en la fabrikado de la unua nombro da radio-aparatoj de Ŝantoŭ.

La idealo inspiras Etan Jaŭ antaŭenmarŝi. Tamen en ĉiu paŝo li renkontis malfacilaĵon pro manko de baza scio. En 1961, kuraĝigate de la partia organizo de la fabriko li lernis en Postlabora Politekniko por Laboristoj kaj Oficistoj de Ŝantoŭ. Li persiste studadis lecionojn kaj mem lernis la anglan lingvon tiel matene kiel vespere kaj ofte ĝis profunda nokto. En 1966, li finis ĉefajn fundamentajn lecionojn de la politekniko kaj povis legi teknikajn materialojn en la angla lingvo.

Pro lia diligenteco kaj studemo, la partia organizo de la fabriko entuziasme lin kulturis kaj ofte donis al li ŝancon de praktiko, kiam li lernis en la politekniko.

En la dua jaro post lernado de Eta Jaŭ en la politekniko, gvidantaro de la fabriko komisiis al li taskon provfabriki ultrasonan aparaton. Tiam en nia lando la ultrasona tekniko estis nova fako kaj troviĝis nur simpla difekto-detektilo por metalo. Iuj kuracaj unuoj uzis ĝin en diagnozo de iuj malsanoj kia hepatito kaj akiris certan efikon. Informiĝinte ke la Unua Popola Hospitalo de Ŝantoŭ havas ultrasonan difekto-detektilon, li tuj tien iris por desegni la cirkviton kaj lerni de kuracistoj ĝian diagnozan teorion. Sekve li decidis provfabriki tiam urĝe bezonatan diagnozaparaton taŭgan por ekzameni homan korpon.

Sub plena subteno de la gvidantaro kaj laboristoj de la fabriko, Eta Jaŭ sukcesis fabriki la unuan aparaton de medicina diagnozo post trimonata ripetada esplorado. Li ekzamenis tiun aparaton en hospitaloj de Kantono kaj Ŝanhajo, por konfirmi ĉu ĝi taŭgas al la klinika diagnozo. Li ofte ĉeestis la diagnozon de kuracistoj, kontaktiĝis kun diversaj pacientoj akceptantaj ultrasonan diagnozon kaj akiris multajn primarajn materialojn. Tiamaniere li povas ĝuste distingi normalan hepaton de la malsana pere de iliaj malsamaj ondoj manifestiĝantaj sur la ekrano, kaj scipovas kontroli informan ondon per ŝanĝo de iu parametro. Dank' al tio fundamente solviĝis la problemo de unueco



de aparatoj. Foje iu paciento de hepata pus-ulcero estis sendita en diagnozejon. Eta Jaŭ kunlaboris kun kuracisto en diagnozo per ultrasona diagnoza aparato. Kuracisto enigis injektilon en la pus-ulceran pozicion montritan de la aparato kaj precize elŝuĉis puson el la hepato. Post kuracado tiu paciento pli kaj pli resaniĝis. Vidante ke la aparato fabrikita de lia fabriko ludis rolon en kuracado, Eta Jaŭ sentis sin tre ĝoja.

Dank' al kombiniĝo de teorio kun praktiko, Eta Jaŭ faris la unuan solidan paŝon en marŝado al scienco kaj tekniko. En 1964, la ultrasona aparato de medicina diagnozo akiris premion de nova produktaĵo de la tuta lando.

Eta Jaŭ ne haltis antaŭ la atingo. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, kun subteno kaj helpo de laboristoj kaj koncernaj unuoj, li provfabrikis transistoran difekt-detektilon kaj sukcese projektis mezurilon, kiu povas manifesti rekte per ciferoj radian rapidecon de sona ondo en objekto.

En aprilo de 1969, Eta Jaŭ kaj aliaj du kamaradoj de la fabriko akceptis en Pekino taskon asignitan de la koncerna ŝtata fako: Esplori kaj fabrikigi precizan difekt-detektilon kapablan trovi minimuman difekton en speciala metala tubo. Gvidantaj kamaradoj klarigis al ili gravan signifon de tiu tasko kaj informis ilin, ke nun kelkaj unuoj ankaŭ provfabrikas tiun aparaton, sed ne sukcesis,

kaj esperas ke la Ŝantoŭ-a Ultrasona Elektron-aparata Fabriko plenumos tiun taskon en plej mallonga tempo.

Grava konfido de supera gvida fako tre ekscitis ilin. Akceptinte tiun taskon, Eta Jaŭ sentis ke li kvazaŭ transprenus "bastoneton" en "stafetokurado". Ĉu ne? Kelkaj unuoj provfabrikas tiun aparaton, kvankam ankoraŭ ne sukcesis, tamen jam antaŭeniris longe. Nun la "bastoneto" atingis lian manon, kaj multaj personoj zorgas kaj esperas ke li daŭre kuru kun tiu bastoneto ĝis la venka fino. Li konsciis: La provfabriko ne rilatas al privata profito kaj estas ne nur teknika problemo sed ankaŭ serioza politika tasko plenumenda laŭ la bezono de revolucio.

Akceptinte tiun taskon, Eta Jaŭ kaj aliaj volis pli frue reveni por tuj komenci la laboron. Tamen tiam li pensis ke por bone transpreni tiun taskon, ili devas unue lerni de koncernaj provfabrikantaj unuoj. Lia propono ricevis aprobon de aliaj. Sekve unu el ili revenis al la fabriko por fari preparon, Eta Jaŭ kaj la alia veturis al koncernaj unuoj por lerni. Kamaradoj, kiujn ili vizitis, senrezerve konigis al ili siajn spertojn kaj lecionojn en provfabrikado. Dank' al tio Eta Jaŭ havis certecon por la renkonteblaj malfacilaĵoj kaj aperontaj problemoj, kaj pli profunde komprenis, ke en nia socialisma patrolando ĉiuj atingoj estas neapartigeblaj de kolektivo. Li pensis en si, ke li certe


venkos, se nur li ĉiam sin metas en amasojn kaj lernas de ili. Li estis pli memfida por plenumi la projektan taskon.

Reveninte la fabrikon, ili tuj sin ĵetis en provfabrikadon. Laboristoj kaj teknikistoj de la tuta fabriko tre zorgis tion, kaj ĉiuj laborejoj kreis favorajn kondiĉojn por tio. Ankaŭ Eta Jaŭ memkonscie lernis de veteranaj laboristoj kaj teknikistoj. Iutage, Eta Jaŭ projektis komutan cirkvito de registrilo. Tiu cirkvito devas transformi elektran signalon de difekt-trovo en movon de registra nadlo. Kiel oni povas transformi ordinaran registrilon malalt-frekvencan kaj malrapidan en altfrekvencan kaj rapidan? Post multaj eksperimentoj li ne akiris rezulton kaj iom ĉagreniĝis. Tiam li venis al maŝin-riparejo kaj ekvidis veteranan laboriston Ĉen Kinghua polurantan ion atente. Alproksimiĝinte li trovis ke ĝi estas nenio alia ol ŝtala nadlo de registrilo, kiun ne produktis tiu fabriko antaŭe. Por garantii kvaliton de la aparato, Ĉen Kinghua persistis poluri ĝin mane kaj ofte ekzamenis ĝian glacecon sur sentema haŭto de sia vizaĝo. Eta Jaŭ akiris grandan instruon kaj ekkomprenis ke li devas venki la malfacilojn en projekto de la cirkvito per tia spirito. Sekve li denove detale analizis la rilaton inter rapideco kaj malra-

videco per la vidpunkto montrita de Prezidanto Maŭ en sia filozofia verko *Pri Kontraŭdiro*. Prezidanto Maŭ diris: “Ĉiuj kontraŭoj transformiĝas sub certaj kondiĉoj en sian malon.” Sub kiaj kondiĉoj okazas la transformiĝo inter rapida pulsa signalo kaj malrapida? Li, kune kun Ĉen Haŭŝeng kaj kelkaj aliaj teknikistoj, serioze analizis la rilatojn inter diversaj akcesoraĵoj kaj diversaj flankoj de la registrilo, faris kelkdek eksperimentojn dum pli ol dudek tagoj, kaj fine trovis la leĝon kaj projektis la komutan cirkvito. Per tio ili sukcese faris la registrilon kapablan registri per linioj la difekt-ondojn rapide aperantajn.

Dank’ al komuna klopodo de li kaj laboristoj kaj teknikistoj de la tuta fabriko dum pli ol kvar monatoj, tiu preciza ultrasona difekto-detektilo estis sukcese provfabrikita. Ekspertizo kaj funkciigo de koncernaj fakoj kaj unuoj atestis ke ĝia kapablo estas tute konforma al la postuloj de projekto.

Dank’ al la edukado de la Partio kaj hardado de produkta praktiko en tiuj jaroj, Jaŭ Ginĝong multe progresis kaj en ideologio kaj en tekniko. En 1971, li membriĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. Nun li plenumas alian provfabrikan taskon de novaj produktaĵoj.



*Jaŭ Ginĝong reguligas novan aparaton kune kun teknikisto.*

# Por Ĉiam Alta Produkto de Pomoj

**E**N mia sepdek-jara vivado, pli ol 50 jarojn mi laboris pri fruktarboj. Antaŭ la Liberiĝo mi prizorgis frukto-ĝardenon por bienuloj, nur post fondiĝo de la nova Ĉinio, mi fariĝis ĝardena mastro. Komparinte la grandan diferencon inter la nova kaj malnova socioj, mi decidis plene dediĉi mian tutan energion al fruktoĝardenoj por la socialismo. Dum la lastaj jaroj mi faris kune kun komunumanoj sciencan eksperimentadon, por koni paŝon post paŝo regulojn de kreskado de pomarbo kaj akceli ĝian fruktodonadon. Nun en nia Delisi-komunumo troviĝas 330,000 pomarboj, t.e. 10-oble de tiuj antaŭ la Liberiĝo, kaj la jara produktokvanto pliiĝis de kelkcent tunoj antaŭ la Liberiĝo ĝis pli ol 10,000 tunoj.

## AL ALTA PRODUKTO

Jam de longe ne stabila estas la fruktodono. Por konstanta alta pomprodukto, oni devas solvi tiun problemon. En 1958 mi elektis 18 pomarbojn de la speco "Guoguang" por fari eksperimentadon. En tiu jaro mi konservis laŭeble multajn florojn kaj junajn fruktojn kaj fine ni rikoltis 11,000 kg., meznombro 600 kg. po arbo. Sed en la sekvinta jaro ni rikoltis de ili nur 290 kg., meznombro 16 kg. po arbo. Kial? Mi opiniis, ke tion kaŭzis eble manko de sterko kaj akvo. Sekve mi decidis sterki kaj akvumi pli multe al tiuj pomarboj. Mi elektis grandan pomarbon, ĉirkaŭ kiu mi fosis profundan kanaleton kaj metis en ĝin abundan diverspecan sterkon. Mi pensis, ke eble la problemo estas fine solvita. Tamen tute ekster mia atendo la pomarbo donis nur 18 florojn en tiu jaro.

Post dufoja malsukceso en la eksperimentado mi pli profunde studis jenajn vortojn de Prezidanto

Maŭ: "Se oni volas sukcesi en sia laboro, t.e. atingi la antaŭkonceptitajn rezultojn, oni nepre devas konformigi siajn pensojn al la leĝoj de la objektiva ekstera mondo; alie oni malsukcesos en praktiko. Spertinte malsukceson, oni ĉerpas el ĝi lecionon kaj korektas siajn pensojn por ilin konformigi al la leĝoj de la ekstera mondo, kaj tiel oni povas turni malsukceson en sukceson." Laŭ tiu ĉi instruo de Prezidanto Maŭ, mi analizis la malsukceson de mia eksperimentado kaj mi ekkomprenis, ke miaj pensoj ne konformiĝis al la leĝo de kreskado kaj fruktiĝo de pomarbo, kaj ke mia antaŭa praktiko estis blinda sur la bazo de neĝusta kono pri nestabileco de pomprodukto. Mi nepre klopodos por bone koni pomarbon!

La partia organizo kaj komunumanoj kuraĝigis min daŭrigi mian eksperimentadon kaj kamaradoj de la superaj agronomiaj instancoj kaj profesoroj de la Ŝenjang-a Agronomia Instituto donis al mi teknikan sugeston. Ekde tiam, mi ĉiutage restis en la fruktoĝardeno, ĉu en frosta vintro aŭ en sufoke varma somero, por zorge observi kreskadon de la pomarboj je ilia burĝoniĝo, floriĝo ĝis fruktodono kaj esplori iliajn interrilatojn. Pri io nekomprenata, mi petis konsilojn de spertuloj. Tiel mi iom post iom konis la kaŭzon de nestabileco de pomprodukto. Pomarbo dividas nutraĵon en si laŭ certaj reguloj: Se en iu jaro la arbo multe fruktodonas, tiam la nutraĵo estas koncentrita sur la fruktoj, kaj la branĉoj kreskas ne prospere, sekve nur malmultaj florburĝonoj povas esti formitaj, tial en la sekvonta jaro ĝi fariĝos ne fruktoriĉa; kontraŭe, se en iu jaro la arbo malmulte fruktodonas, tiam la nutraĵo estas koncentrita sur branĉoj, ili do kreskas prospere kun multaj florburĝonoj, kaj en la sekvonta jaro, ĝi multe fruktodonas. La



*Gang Ginhoŭ ekzamenas pomarbon.*

du fenomenoj aperas alterne ja pro tio, ĉu la donita nutraĵo estas sufiĉa al fruktodono aŭ kreskado de la pomarbo.

Post eltrovo de la leĝo mi provis dividi racie nutraĵojn al pomarboj per pritondo de ĝiaj branĉoj, por solvi nestabilecon de poma produkto. Mi pritondis la branĉojn laŭ kreskado de burĝonoj. Fine formiĝis por mi metodo, kiu dividas la branĉojn en tri grupojn: La unua, arbokreskado, dua, fruktodonado kaj tria, florburĝonado, kies roloj laŭvice ŝanĝiĝas. La metodo ebligas la pomarbojn multe fruktodoni ĉiujare.

Nun, la jara pom-produkto de nia komunumo restas stabile ĉ. 10,000 tunoj kaj iom altiĝas ĉiujare. La fakto montras, ke en la mondo ekzistas nur afero nekonata sed nenio nekonebla.

## **ANKAŬ JUNAJ POMARBOJ FRUKTODONAS**

La sekvinta problemo estas kiel fruigi fruktodonon de junaj pomarboj. Proverbo diras: "Por ĝuado de memkulturataj pomoj, 15 jarojn atendu homoj." Tio signifas, ke 13-14-jara pomarbo ankoraŭ malmulte fruktodonas. Nia komunumo havis tiam pli ol centmil tiajn junajn pomarbojn.

Se ili pli frue donus fruktojn, tio ja estus granda kontribuo al la ŝtato. Pri tio iuj dubis: "Ĉu arbetoj kun multaj fruktoj ne tro laciĝos kiel infanoj tro ŝarĝitaj per pezaj laboroj?" Sed laŭ mi probable ne. Ĉio ŝanĝiĝas laŭ homaj klopodoj. Tion ni devas provi.

Mi zorge studis la suprediritajn problemojn. Kaj por tio mi vizitis multajn fruktoĝardenojn, observis multajn junajn pomarbojn kaj rimarkis, ke ordinare, 8-9-jaraj pomarboj kreskas tre rapide sen fruktoj. Sed mi trovis sur la montdeklivo norde de nia vilaĝo malgrandan pomarbon, kiu estas nur sesjara kaj jam portas pli ol 60 fruktojn. Kial nur ĝi povis doni tiom multe da fruktoj kaj aliaj ne? Poste mi rimarkis, ke kreskado kaj fruktado estas du flankoj de la kontraŭdiro. Se ili estus ĝuste pritraktataj, oni ricevos kaj florojn kaj fruktojn. Alie la arbo aŭ nur kreskas aŭ antaŭe kadukiĝis pro troa ŝarĝo de fruktoj. Ĉi tiun veron ni ne konis antaŭe kaj absolutigis la du kontraŭstarajn flankojn, tial ni fortondis malmultajn florburĝonojn de junaj pomarboj timante ke ili malhelpos kreskadon de la arbo. Tamen la troa pritondado pli incitis ĝian kreskadon, sekve ĝi fruktodonis pli malfrue kaj pli malmulte. La supre dirita pomarbeto estis preterlasita dum pritondado kaj sterkita ne ĝustatempe, tial ĝi kreskis neampleksa kaj neprospera kaj fruktodonis pli frue. Tiamaniere ni eltrovis la vojon al pliprodukto per pritondado de junaj arboj.

Dank' al tio ni atingis relative idealan rezulton: Sesjara pomarbo de la speco "Guoguang" komencis fruktodoni, okjara donis 43.5 kg., 9-jara 52 kg., kaj 10-jara jam 60 kg. En nia eksperimentejo troviĝas sume 370 pomarboj de la specoj "Guoguang" kaj "Giguan" meznombro kun aĝo de 12 jaroj, kiuj donis po 60 kg. kaj cetere kreskas prospere.

## **DENSPLANTADO KUN NEDENSAJ BRANĈOJ**

Kulturistoj de fruktarboj ofte diras: "Fruktarboj ne kreskas sen sterko nek fruktodonas sen sunlumo." La sunlumo ja estas grava kondiĉo por fruktado.

Jam frue en la jaro 1954, kiel membro de enketa grupo organizita de la provinca agronomia instituto, mi vizitis multajn lokojn por ekzameni kreskadon de fruktarboj. Tiam mi konstatis, ke por akiri pli da sunumo la fruktarboj estis plantitaj

tre maldense kaj ke la arboj apartiĝis unu de alia 7 metrojn. Tiamaniere grandaj terpecoj estis malŝparitaj. Eĉ sur montdeklivoj kie fruktarboj neniel povas kreski grandaj oni plantis ankaŭ tiel maldense ke troviĝis nur dekelkaj arboj po muo, dum la po-mua produktokvanto restis malalta. En nia komunumo ĉiu persono havas meznombro nur 0.9 muon da tero. Maldensa plantado de frukt-arboj neeviteble okupas multe da agroj. Ĉu racian densplantadon oni povas enkonduki ankaŭ en fruktoĝardenon? Pri tio la eksperimento de densplantado farita de Ŝandong-provinco min konvinkis. Ni faris enketon en nia loko pri sufiĉe densplantita fruktoĝardeno sur montodeklivoj de Hedong-produktogrupo. Tie la arboj kreskis alte kaj amplekse kaj kun interplektiĝantaj branĉoj, tamen iliaj fruktoj estis ne multaj nek grandaj. Ĉar la sunumado ne estis sufiĉa. Ni faris statistikon pri fruktoj de iu pomarbo: la verdaj fruktoj konsistigas dudek procentojn, la ruĝaj ne atingis duonon kaj la ceteraj estas duonruĝaj kaj duonverdaj; plejparto de la ruĝaj fruktoj pendas sur supra parto de la arbo, kaj ju pli malsupre des pli malmulte. Enketo montris, ke sunumo en supra kaj ekstera partoj de la arbo estas pli bona ol tiu en la interna kaj malsupra partoj. Tio pruvas, ke sen bona sunumado, ne povas esti riĉa fruktodono.

Mi ekkomprenis el la supra enketado, ke nur densa plantado ankoraŭ ne povas altigi pomprodukton, ĉar por ĉiu arbo mem ekzistas ankaŭ problemo de denseco kaj sunuma sufiĉeco. Ĝusta metodo devas esti: planti arbojn iom dense kaj lasi la branĉojn iom maldense, t.e. malpli da dikaj branĉoj kaj pli da branĉetoj. Mi nomas tiun metodon "densplantado kun nedensaj branĉoj".

Por tia densplantado plej grave estas havigi bonan formon al la arboj. Mi forigis la sunlumban supran parton de arbo kaj fortranĉis tiujn branĉojn, kiuj malhelpas sunumadon interne de la arbo. La arbokrono estis mallongigita je ĉ. unu metro kaj restis nur 5-6 dikaj branĉoj interplekti-

ĝantaj supre kaj malsupre en du tavoloj, tiel ke la tuta arbo povas esti bone sunumita. La rikolto montris, ke la produktokvanto multe superis tiun de fruktarboj altaj kaj ampleksaj.

Printempon de 1960, ni faris tian densan plantadon sur granda areo, komence de kulturado de junaj pomarboj. Ni difinis la distancon inter la arboj je 4 metroj laŭvice kaj intervice, aŭ 5 metroj intervice, anstataŭ la antaŭaj 7 metroj ambaŭ laŭkaj intervice. La elektitaj pomspecoj estis "Guoguang" kaj "Giguan". Kiam arbotrunko kreskas ĝis 0.6 metro, ni iel ĉesigis ĝian kreskadon kaj restigis al ĝi tri ĉefajn branĉojn por ke ĝi estu malalta kun malgranda arbokrono kaj facile ricevu nutraĵon. Por doni sunumadon internen de la arbo la alia tavolo de branĉoj apartiĝas de la unua unu metron. Post kiam la kvara branĉo estis difinita, ni fortranĉis la arbokronon kaj restigis la kvinan branĉon anstataŭ ĝi por ke la arbo kresku en duonronda formo. La kvina branĉo devas kurbigi norden kaj kreski kontraŭ vento. La praktiko de dekdu jaroj montras al ni, ke tia arboformo estas pli facile havigebla, la trunkoj kaj arbokronoj estas malaltaj, la sunumado estas ĉiuflanke sufiĉa. Ĝi fruktodonas ambaŭ ekstere kaj interne de la arbokrono, tial la produkto estas alta. En 1971 la po-mua produktokvanto de "Guoguang" kun aĝo de 10-12 jaroj en nia densplanta eksperimentejo estis 2,000 kg., kiu estis pli ol duoblo de tiu de la fruktoĝardeno kun arboj maldense plantitaj.

Dum la pasintaj dudek jaroj ni sukcesis iom koni la leĝon pri arba pritondo kaj akumulis iajn spertojn. Ĉio ĉi tio estas la rezultato de nia persisto ĉe scienca eksperimentado laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ.

---

*\*Ĝang Ginhoŭ estas tutlanda labormodelo kaj konstanta membro de la revolucia komitato de Delisi-komunumo en Fuhian-gubernio, Liaŭning-provinco.*



## BATALO KONTRAŬ DEZERTO EN LA RIVEROKCIDENTA KORIDORO

La Riverokcidenta Koridoro troviĝas en la okcidenta parto de Gansu-provinco kaj inkluzivas 21 guberniojn. Ĝi estas longa ebena zono, kies norda parto estas la dezertoj Badangilin kaj Tengli.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la kamparanoj de tiu loko suriris la vojon de kooperativigo kaj komencis batalon kontraŭ sablovento per la kolektiva forto. Precipe en 1958, post la fondo de popola komunumo, la vastaj amasoj kaj sciencaj laborantoj komencis laŭplane reformi la dezertojn. Nun, de Dunhuang-gubernio ĉe la okcidenta fino tra la suda rando de la dezerto ĝis la orienta parto de Gingtaj, konstruiĝis forstozono kun longeco de pli ol 1,600 km. tra 16 gubernioj, kiu efike baras sabloventon kaj akcelis la disvolviĝon de agrikulturo. Dunhuang-gubernio, ĉirkaŭata de dezerto, iom post iom reakiris la kampojn englutitajn de sablo kaj krome konstruis multajn kampojn en la dezerto. En la pasinta jaro, riĉa rikolto estis akirita post venko de serioza sekegeco. La po-mua produkto-

kvanto de greno atingis pli ol 275 kilogramojn, dum antaŭe nur ĉ. 50 kilogramojn.

## NOVAJ SPECIOJ DE TRITIKO KAJ RIZO ELKULTURITAJ PER POLENO

La sciencaj laborantoj de la Genetika Instituto de Ĉina Akademio de Sciencoj malfermis novan vojon por elkulturo de novaj specioj de tritiko kaj rizo. Ili ricevis tritikajn kaj rizajn plantojn rekte el poleno per histokultura metodo.

Dum la eksperimentoj, anteroj de la unua-generacia hibridigita tritiko aŭ rizo estis metita en artefarita kultura medio. La polenaj grajnoj estis stimolitaj por dividiĝo kaj kresko en ĉelmason (*kaluson*) kaj poste translokitaj al alia medio por ke ili radikigu, burĝonu kaj formu plantojn. En 1972, kelkaj bonaj kaj stabilaj specioj tiamaniere akiritaj estis prove kulturitaj en Hejlonggiang-provinco kaj la antaŭurbo de Pekino por fari surkampan ekzamenon kaj tio altiris la atenton de kultivistoj.

La kutima metodo uzata en Ĉinio por akiri stabilan novan specion per hibridigado ordinare bezonas 7 aŭ 8 jarojn. Novaj specioj povas esti ricevitaj per la nova metodo sen bezono de plur-generacia selektado. Kaj la plantoj elkulturitaj per tiu metodo montriĝas unuecaj jam en la komenco. Tiu ĉi metodo estas grava ankaŭ por plua studo pri la teorio de heredo kaj variado de altklasaj plantoj.





# Altigi Agrikulturan Produktadon per Sciencia Kulturado



Dank' al amasa sciencia kulturado, la grena produktokvanto de Nangonggia-brigado de Bejma-komunumo, Ŝandong-provinco, grandskale altiĝis, kaj ĝia pomua grena produktokvanto de 1972 atingis pli ol 800 kg. Jen membroj de ĝia sciencia eksperimenta grupo kaj maljuna kamparano faras eksperimenton pri burĝonado de tritiko.



Intelektaj junuloj de Gehi-brigado, Sandong-provinco, aktive disvolvas scian eksperimentadon por fari bakterian sterkon kaj insekticidon. Tiu brigado produktis pli ol 100,000 kg. da bakteria sterko kaj insekticido en la jaro 1972. Jen junulinoj faras eksperimenton por altigi la kvaliton de bakteria sterko.





Teknikaj laborantinoj de la Agromia Instituto de Huaĵong-gubernio, Hunan-provinco, faras ekspertizon al bonspecia rizo.


Agromia stacio de Ŝuangŝuj-komunumo de Guangdong-provinco projektas rizplantiĵojn per plasta membrano por garantiĝi ĝustatempan transplantiĵon de fruaj rizplantiĵoj.





Giejang-gubernio de Guangdong-provinco aktive disvastigas bonan specion de rizo "Kozii-6". La pomua produktokvanto de 3,400 muoj da frua rizo eksperimente kulturitaj de ili atingis 480 kilogramojn. Jen veterana kamparano Lin Mukjuan kaj komunumanino ekzamenas kreskadon de tiuspecaj rizplantoj.

La produktaj grupoj de Vanggia-brigado, Ŝandong-provinco ĉiuj starigis sian scienca eksperimentan grupon. Dank' al longdaŭra scienca kulturado, ilia pomua produktokvanto de greno altiĝis de 145 kg. ĝis pli ol 500 kg. Jen sciencaj laborantoj faras grundan analizon por pli racie kulture agrikulturajn plantojn.





Juetan-brigado de Henan-provinco kulturis pli ol 300 agronomiajn teknikistojn el kamparanoj kaj kulturis 5 bonajn speciojn de tritiko. Jen teknikistoj de la brigado ekzamenas tritikajn semojn.



Komunumanoj de Sigiking-komunumo en pekina antaŭurbo kulturis kukumojn en sia forcejo.



Kunming-magazeno

# Kunming—la Urbo de Printempo

Kunming, la antikva kaj bela urbo en nia sudokcidenta limregiono, estas la politika, ekonomia kaj kultura centro de Junnan-provinco, kie loĝas pli ol 1,500,000 han-oj, huj-oj, ji-oj, baj-oj, mjaŭ-oj, hani-oj kaj aliaj.


La klimato de Kunming ĉirkaŭata de montoj estas milda kaj pluvabunda. Ĝi estas renoma kiel Urbo de Floroj pro ĉiam verdaj arboj kaj diversaj floroj.

Starante sur Juantong-monto de la urbo oni povas vidi pitoreskan plejzaĝon: La vasta Dianĉi-lago estas punktita de ŝipoj plensarĝitaj de varoj, ĝia vasta borda fekunda kamparo kovriĝas per verdaj plantoj; ĝia nordokcidenta antaŭ-urbo formas novan industrian kvartalon; kaj la bulvaroj ornamas la urbon pli bela. En la ĉirkaŭo de la urbo troviĝas ankaŭ multaj vidindejoj, inter kiuj estas la varma fonto Anning, la Draka Pordo de la Okcidenta Monto sur kruta rok-muro, pitoreska Daguanloŭ kaj la groteska “ŝtona arbaro” de Lunan...


Sed en la malnova Ĉinio la industria bazo de tiu ĉi bela urbo estis tre malforta pro la kruela prirabado de imperiistoj kaj subpremado kaj ekspluatado de la kuomintangaj reakciuloj. Tiam ĉie vidiĝis superflujaj varoj de imperiistoj kaj la laborantaj popoloj vivis tragike. Post la Liberiĝo, la diversnaciecaj popoloj de la tuta urbo konstruis, sinapogante sur la propraj fortoj kaj luktante en malfaciloj, pli ol 380 fabrikojn de metalurgio, maŝinoj, instrumentoj, elektroniko, konstruaj materialoj, ŝpinteksado, kemia industrio, elektro kaj aliaj, kaj tiel ĝi fariĝis unu el la gravaj industriaj bazoj de Junnan-provinco.

Kunming, la antikva konsumata urbo en la pasinteco, nun jam fariĝis nova kaj ĉiam pli juna industria urbo.

Angulo de la industria distrikto apud la Okcidenta Monto










Junnan-a Naci-malplimulta Instituto



Gajaj infanoj






Velŝipoj revenas.



La Draka Pordo de la Okcidenta Monto

Nova fizionomio de Dianĉi-lago





Gianfeng-lago en la "stona arbaro"

# Hodiaŭ en la Ĉirkaŭaĵo de Dongting-lago



Velŝipoj plenŝarĝitaj de varoj sur la lago apud la turo Juejangloŭ

Dongting-lago en la norda parto de Hunan-provinco kaj en la meza baseno de Jangzi-rivero estas unu el la plej grandaj dolĉakvaj lagoj de Ĉinio. Ĉirkaŭ ĝi sin trovas vasta regiono de pli ol 17,000 kvadrataj kilometroj, inkluzive de la dek gubernioj Miluo, Juejang, Hiangjin, Huajong, Nanhian, Anhiang, Ĉangde, Hansoŭ, Jijang kaj Juangiang. Tiu loko kun fekunda tero famiĝis pro abundeco de fiŝoj, rizo kaj aliaj produktaĵoj.



En la malnova socio, la tieaj kamparanoj vivis tre mizere pro oftaj superakvegoj kaj kruelaj ekspluato kaj subpremo fare de la bienula klaso. Post la Liberiĝo, la popolanoj loĝantaj ĉirkaŭ la lago sub la gvido de la Partio konstruis, kun senprecedenca entuziasmo por konstrui socialismon, pli ol 6,100 pumpstaciojn, instalis pli ol 3,800 kilometrojn da alt-tensiaj elektrofadenoj, kaj per tio fundamente efektivigis en la tuta regiono elektrajn drenadon kaj irigacion kaj garantias riĉan rikolton al 70% de la kampoj. La dek bordaj gubernioj gajnis riĉan rikolton en sinsekvaj 11 jaroj, la pomua grena produktokvanto de la plejparto de tiuj gubernioj superis 400 kilogramojn, kaj tiu de la triono de iliaj komunumoj kaj brigadoj superis 500 kilogramojn. Ankaŭ la produktokvanto de fiŝoj kreskas jaron post jaro kaj nun ĉiujare atingis pli ol 23,850 tunojn.

Kun la disvolviĝo de produktado, la popola vivo altiĝas rimarkinde.



Rizkampoj atente zorgataj de komunumanoj






Li Guangking, sekretario de la partia filio de Ĝuanggia-kiaŭ-brigado, parolas al komunumanoj pri la kultursistemo de tri rikoltoj de tritiko kaj rizo en unu jaro.



Traktoroj survoje



Parto de la Malisi-a Elek-  
tra Pumpstacio de Huajong-  
gubernio



Kulturado de lotuso kaj bre-  
dado de anasoj en la lago



Kolektado de te-folioj

Papero farita el fragmitoj





Fiŝado

Fiŝbredejoj de Hiang-  
ĵin-gubernio



# Kresku Ankoraŭ Pli Rapide la Novaj Kadroj

**E**N ĉiunivelaj gvidantaroj de la Vuhi-a Unua Kokon-malbobenejo de Giangsu-provinco, Ĉinio, troviĝas certa nombro da novaj kadroj. Ekzemple, el la 15 membroj de la partia komitato de tiu fabriko estas 11 novaj kadroj promociitaj el laboristoj. Tiuj vivecplenaj novaj kadroj ludis spinan rolon en revolucio kaj konstruado.

Kiam oni demandas, kial la novaj kadroj de

tiu fabriko kreskas tiel rapide, la novaj kadroj diras, ke tio tute dependas de la eduko kaj kulturo de la Partio kaj la entuziasma helpo de malnovaj kadroj. Dum la lastaj modeste respondas, ke ili helpas unu alian. Por ke la afero de la Partio estu daŭrigata, estas ilia plenumenda devo, ke ili faras pli multe da laboroj por kulturi novajn kadrojn. En tiu fabriko, helpado de malnovaj kadroj al la novaj jam fariĝis moro.

*Ĝaŭ Hiuĵong, juna vicsekretario de la partia komitato, interparolas kun gelaboristoj.*



## VARMA HELPO

Post la hardado en la Granda Proletara Kultura Revolucio, kelkaj antaŭaj malnovaj kadroj de tiu fabriko funkcias kiel ĉefaj gvidantoj de la partia komitato. Granda nombro da novaj kadroj devenintaj de laboristoj aperis en la batalado kaj ankaŭ en ĝi altiĝis ilia talento por revolucio. Iuj el ili estis elektitaj ankaŭ en la partian komitaton. Por helpi novajn kadrojn ellerni gvidan laboron, ĉiu malnova kadro, kune kun 2-3 novaj studas Marksismon-Leninismom kaj verkojn de Prezidanto Maŭ kaj ankaŭ spertigis ilin en gvida laboro.

Guo Gendi, kiu eklaboris kiel knabin-laboristino en sia okjara aĝo, estas nova kadro kun 30 labor-jaroj. Kiam ŝi eklaboris kiel membro de la partia komitato antaŭ kvar jaroj, la partia komitato asignis ŝin zorgi kune kun vicsekretario Su Hujfen la laboron de eduko pri la Partio en la tuta fabriko. Por altigi ŝian kapablon de sendependa laboro, Su Hujfen intence lasis ŝin sola doni lekciojn pri la Partio al la partianoj. Guo Gendi pensis en si: kiel mi, kun malalta klereco kaj sen sistema studo de teorio, povas lekcii al aliaj? Ŝi sentis tion tre malfacila. Su Hujfen unuflanke kuraĝigis ŝin kaj aliflanke helpis ŝin en preparo de programo de lekcio kaj pacience aŭskultis ŝian provlekiadon. Ĉiufoja preparo de lekcio ofte okupis 2-3 tagojn de Su Hujfen. Kortuŝite de tio, Guo Gendi kuraĝigis en lekiado. Pro tio Su Hujfen tre ĝojis kaj daŭre stimulis ŝin dirante: "En la revolucia vicaro ĉiuj kamaradoj devas helpi kaj zorgi unu alian." Stimulate kaj helpate de Su Hujfen, Guo Gendi ĉiuflanke sin hardis kaj tre rapide altigis sian laborkapablon venkinte malfacilojn unu post alia. Post transpostenigo de Su Hujfen al gvida laboro en

supera institucio en 1971, Guo Gendi fariĝis vicsekretario de la partia komitato de la fabriko.

## KURAĜA ARANĜO

Jang Mingĝen, 26-jara, estas la plej juna el la membroj de la partia komitato. Antaŭe ŝi estis juna laboristino de kokon-elekto kaj estis elektita kiel membro de la gvidantaro en la granda kultura revolucio. Por helpi ŝin altigi laborkapablon, malnovaj kadroj ŝin instruis en detaloj. Kvankam ŝi ellernis certajn metodojn de gvidado post iom da tempo, tamen ankoraŭ estis malfacile por ŝi labori memstare. Foje aŭskultinte ŝian lecion pri politiko laboristoj diris, ke ĝi estas malpli facile komprenebla kaj memorebla kaj malpli intima ol tiuj faritaj de spertaj kadroj.

Kelkaj malnovaj kadroj en la partia komitato konsciis el la diroj de la amasoj pri Malgranda Jang, ke mankas sperto pri praktika laboro al la junaj novaj kadroj kia Jang Mingĝen, nove promociitaj el laboristoj kaj ili devas lasi ŝin lerni en laboro por ke ŝi altigu sian kapablon en batala praktikado.

Septembre de 1971 ardis la amasa movado de pliprodukto kaj ŝparado en la tuta fabriko, sed malpli rapide disvolviĝis la movado en la laborejo de revolvado. La partia komitato decidis ke Malgranda Jang laboru en ĝi. Tiam iuj opiniis, ke tiu laborejo havas rektan influon al la produktado de la tuta fabriko kaj ĉe la ŝlosila momento ĉefaj gvidaj kadroj de la partia komitato de la fabriko devas persone zorgi pri tiu laborejo. Antaŭ tiu opinio la partia komitato asertis, ke novaj kadroj povas sin hardi kaj kreski nur en batalado. Ĉu lasi ilin labori memstare aŭ ne estas afero koncer-



*Malnova kadro Ĝoŭ Ahiang (meze) kaj novaj kadroj Guo Gendi (dekstre) kaj Ĝaŭ Hiuĵong (maldekstre)*

nanta la gravan problemon kun kia gvida penso oni kulturis daŭrigantojn de la proletara revolucia afero. La partia komitato firme praktikis la supremencitan decidon kaj Malgranda Jang venis en la laborejon kaj eklaboris tie. Komence interbabilante kun laboristoj ŝi ofte ne povis kapti ŝlosilan punkton kaj traktante problemon ŝi ne povis distingi la ĉefan kontraŭdiron dis de la aliaj. Sed anstataŭ submetiĝo al la malfaciloj ŝi persistis labori kune kun la laboristoj, profundiĝis en la amasojn por fari enketon kaj esploron kaj serioze studis la verkon de Prezidanto Maŭ *Pri Kontraŭdiro*. Finfine, ŝi kune kun la membroj de la laboreja partia filio trovis kaj solvis la ĉefan problemon ekzistantan en la laborejo, kaj ĝi kuratingis aliajn unuojn de la fabriko en la movado de pliprodukto kaj ŝparado.

De la lastaj jaroj Malgranda Jang, sub la unuigita gvido de la partia komitato, profundiĝis en praktikan vivon, malfrivole prenis sur sin pezajn laborojn kaj senĉese altigis sian kapablon por sendepende analizi kaj solvi problemojn. Laboristoj diris ĝoje: “Mingĝen fariĝis pli kapabla en la lastaj jaroj.”

### RECIPROKA SUBTENO

Ĝoŭ Ahiang, membro de la partia konstanta komitato kaj vicestro de la revolucia komitato de la fabriko estis ordinara laboristino kaj fariĝis kadro en la komenca periodo post la Liberiĝo de nia lando. Ŝi laboris sinsekve kiel prezidanto de la sindikato, vicdirektoro kaj vicsekretario de la partia komitato de la fabriko. En la granda kultura revolucio ŝi kiel veterana kadro estis plej frue elektita en la gvidantaron. Inter la gvidaj membroj de la partia komitato multaj estis antaŭe ŝiaj subuloj. Tiuj novaj kadroj estas pli junaj, laborintaj malpli longe por la revolucio, malpli spertaj kaj kapablaj ol Ĝoŭ Ahiang. Sed ŝi elmetis al si rigoran postulon, ne fieras pro sia veteraneco. Per sia agado ŝi praktikas la instrukcion de Prezidanto Maŭ: **“Ĉiuj veteranaj kadroj devas bonvenigi la novajn kadrojn kaj ilin zorgi kun grandega entuziasmo.”**

Aŭguste de 1970 en reelektado de la partia komitato ŝi aktive proponis kiel kandidatojn de vicsekretarioj de la partia komitato la du novajn kadrojn de la partia komitato kiuj laboris kiel gvidantoj de laborejoj.

Julie de 1971, post transpostenigo de la sekretario de la partia komitato de la fabriko oni diris al ŝi: “Ahiang, nun vi devas preni sur vin la pezan



*Guo Gendi, vicsekretario de la partia komitato de la fabriko en laboro*

laboron.” Ŝi respondis: “Ni ne devas mezuri la pezecon de laboroj nur per la rango de la oficoj.” Kiam la supera partia organizo demandis ŝin pri ŝia opinio, ŝi aktive rekomendis Ŝi Fakjuan, vicsekretarion de la partia komitato devenintan de hejtisto, kiel sekretarion.

Krom rekomendi harditajn novajn kadrojn al postenoj pli gravaj ol la sia, Ĝoŭ Ahiang ankaŭ varme subtenis tiujn kamaradojn en ilia laboro. En la antaŭa duono de la lasta jaro ne estis stabila la kvalito de kruda silko de la aŭtomata kokonmalbobenejo. Pro tio Ŝi Fakjuan tre maltrankviliĝis kaj dumtempe ne povis trovi solvon. Ĝoŭ Ahiang meminciate petis labori en tiu laborejo. En laborado ŝi trovis, ke la maŝinoj en tiu laborejo ne povis disvolvi plene siajn kapablojn pro manko de taŭga manipulado. Ŝi tion raportis al la partia komitato kaj kune kun Ŝi Fakjuan mobilizis en tiu laborejo la amasojn por serĉi leĝon pri manipulado de aŭtomataj malbobenaj maŝinoj kaj, forminte manipulan metodon, efike altigis la kvaliton de kruda silko.

En laboro, inter Ĝoŭ Ahiang kaj novaj kadroj ofte okazis disputoj, kiujn ili povis solvi konscie

aplikante la armilon de kritiko kaj memkritiko. Rilate al la kritikoj de novaj kadroj, ŝi firme akceptis kaj subtenis la ĝustajn opiniojn elmetitajn de novaj kadroj konsiderante la revoluciajn interesojn sed ne la proprajn. Iufoje la kvalito de kruda silko malstabiligis en procezo de reformo de silkkunigilo fare de laboristoj kaj oficistoj. Okazis inter membroj de la partia komitato disputo pri tio, ĉu la reformado al silkkunigilo estu daŭrigata. Kiel direktanto de produktado Ĝoŭ Ahiang pensis, ke ŝi devas respondecigi pri la kvalito de kruda silko, ŝi do proponis reapliki la malnovajn silkkunigilojn. Tamen iuj novaj kadroj kritikis ŝin kiel konservativan. Ŝi ĝojis kore vidante ke nova kadro elmetis al ŝi akran kritikon por subteni novan aferon. Post neigo de ŝia opinio ŝi tutkore plenumis la rezolucion aprobitan de la partia komitato. Matene de la sekvanta tago

kune kun aliaj en la renoviga grupo ŝi detale analizis la kaŭzon de apero de maldelikata silko el la novaj silkkunigiloj. Subtenate de la partia komitato, ŝi finfine solvis kune kun aliaj la problemon de maldelikata silko kaj altigis la kvaliton de kruda silko, dank' al ripetada eksperimento.

Resumante la sperton en tiu afero, Ĝoŭ Ahiang profunde sentis, ke la novaj kadroj estas sentemaj je politiko, rapidaj je akcepto de novaj aferoj kaj riĉaj je revolucia entuziasmo, kaj ĝuste ĉio ĉi tio mankas al ŝi mem. Pro tio ŝi decidis lerni de ili kaj samtempe gaje diris: "Ke granda nombro da novaj kadroj rapide kreskas, tio montras ke prosperas la aferoj de nia partio. Ni devas varmkore bonvenigi kaj subteni ilin por ke ili superu nin mem."

## NOVAJ ĈINAJ ESPERANTAJ ELDONAĴOJ

### Militirado Norden kaj Suden

(bildrakonto)

174 p.

18.5 x 13 cm.

Prezo: £ 0.11

US\$ 0.30

La bildrakonto "Militirado Norden kaj Suden" estas kompilita kaj pentrita laŭ la samnoma filmo. Ĝi priskribas la heroaĵon, ke en 1947 la orientĉiniaj trupoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, laŭ la strategia dispozicio de Prezidanto Maŭ, forte subtenate de la lokaj milico kaj amasoj, disvolvis bravecon kaj lertecon en batalado, efike manipulis kaj retenis la malamikojn dum la tri blok-atakoj sinsekve ĉe la vilaĝo Taŭcun, la monto Ĉielskrapanto kaj la stacio Gianggjunmiaŭ, unuanime batalis en intima kunagado kun frataj armeaj unuoj kaj gajnis grandan venkon de plena ekstermo de la malamikoj.

### Pejzaĝo de Pekino

(serio da ilustritaj poŝtkartoj)

12 pecoj

15 x 10 cm.

Prezo: £ 0.08

US\$ 0.18

**Eldonis: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio**

**Distribuas: Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo (P. O. Kesto 313,  
Pekino, Ĉinio)**

**Mendeblaj ankaŭ ĉe diverslandaj perantoj de El Popola Ĉinio**



# Novaj Aferoj en Mjaŭ-vilaĝo

**L**A Hianghi-a Tuĝja-mjaŭ-a Aŭtonoma Sub-provinco situas en la okcidenta parto de Hunan-provinco, Ĉinio. Tiu regiono estas ĉirkaŭata de montoj kaj ĉie troviĝas verdaj arboj. Pezaj spikoj de rizo en ŝtuparkampoj ondas en vento kaj dissendas agrablan aromon, kio aŭguras riĉan rikolton en la kuranta jaro. Fako estas, ke riĉa rikolto estas akirita ĉiujare dank' al la solida unuiĝo de la ĉi-tie loĝantaj diversnaciaj popoloj por aktiva entrepreno de akvoutiliga konstruado kaj plimultigo de agroj per ekspluato de virgatero. Ili ĉiuj vivas feliĉe. Ĉi-tie oni facile trovas novajn homojn kaj novajn aferojn, kiuj montras nacian solidarecon kaj amikecon.

## KORO KUN KORO

En la lasta jaro la mjaŭ-aj komunumanoj de Njujan-brigado de Fenghuang-gubernio konstruis per siaj propraj manoj malgrandan hidroelektrejon kaj instalas al siaj domoj elektrolampojn. Tio tre ĝojigis ilin, kvazaŭ ili estus solenantaj feston. Tamen ili ne forgesis, ke la han-aj komunumanoj de la najbara Hinguang-brigado ankoraŭ ne havas elektron por lumigado. Tiam Long Kioŭ-en, estro de iu produkta grupo de Njujan-brigado pensis: Simile al bambuoj kreskantaj el la sama radikoj, ni kaj la han-aj fratoj ligiĝas koro kun koro, tial ni nepre klopodos por ke ili kune kun ni dividu la feliĉon. Li tuj ekagis kun la membroj de sia produkta grupo por fari preparon necesan por la instalado de elektraj fadenoj.

La ĝojinda informo tuj flugis al Hinguang-brigado ĝis ĉies oreloj. Ĉiuj membroj de la brigado ĉu viraj aŭ virinaj tuj reagis: Iuj sin anoncis por haki arbojn sur montoj kaj aliaj iris al la urbo por aĉeti dratojn; ĉiu estis ege okupita. Tamen en tiu momento al ili venis la komunumanoj de Njujan-brigado alportante elektrajn fadenojn, transformatorojn kaj krome estis alsenditaj ankaŭ elektristoj. Rezulte de tio ĉiuj domoj de la membroj de Hinguang-brigado rapide posedis elektrajn

lampojn. Por memorigi tiun ĉi aferon la komunumanoj nomis la nove instalitajn elektrajn fadenojn "korligantaj fadenoj", kiuj kunligas por ĉiam la korojn de la mjaŭ-a kaj han-a popoloj.

## NOBLA MORALO

Onklino Long Lanhong pli-ol-sesdekjara estas mjaŭ-a komunumano de Damensan-brigado de Fenghuang-gubernio. Foje, ŝi iris al kooperativo ĉe Kiangongping por ion aĉeti. Revenante ŝi subite trovis ledan monujon ĉe vojrandoj. Ŝi prenis ĝin, malfermis kaj trovis ĝin plena je bankbiletoj. Onklino Long pensis: Mi estas membro de la popola komunumo, kaj mi devas esti homo senegoisma kaj nepre redonos la monon al la perdinto. Ŝi intencis laŭte krii por fari demandon al apudirantoj, sed kiam ŝi ĵetis sian rigardon ĉirkaŭen, ŝi trovis neniun. Kion fari? Ŝi supozis, ke la perdinto certe revenos por serĉi la monujon, tial ŝi atendis sidante apud la vojo. Longa tempo forpasis, tamen neniu aperis. La onklino maltrankviliĝis kaj decidis doni la monon al la revolucia komitato de la komunumo por ke la lasta provu trovi la perdinton. Iu kamarado de la komitato transprenis la monujon de la onklino kaj konstatis ke la monsumo entenita totaliĝis je 3,000 juanoj. "Onklino, vi agas laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ,

*Mjaŭ-a maljunulino Long Lanhong (la dua de maldokstre) elektas semon por la produkta brigado.*



ni ĉiuj devas lerni de vi.” Ŝin laŭdis la kamarado kaj samtempe konsolis ŝin: “Onklino, ne maltrankviliĝu, ni nepre trovos la perdinton kaj transdonu al li la monon!”

La perdinto estis kadro de la greno stacio de la komunumo. Kiam li reprenis la perditan monon, li estis forte kortuŝita. Li tuj skribis leteron per peco da ruĝa papero por montri sian dankon. Li ankaŭ iris al la domo de la onklino akompanate de aliaj kamaradoj de la stacio kaj esprimis sian laŭdon pri ŝia nobla moralo.

## MJAŬ-A POŝTISTO

Lastjare la poŝtejo de Giŝoŭ-gubernio ricevis el Baŭzi-brigado de Huaĵong-gubernio leteron adresitan al “Respondeculo de Goŭjandong de Giŝoŭ”. Kun la letero en la mano mjaŭ-a poŝtisto Long

*Kamarado Long Zigin ĝustatempe alportas  
jurnalojn kaj leterojn al komunumanoj.*



Ziging dronis en meditado. De multaj jaroj li laboris kiel poŝtisto en tiu ĉi urbo kaj bone konis ĉiujn ĝiajn stratojn kaj vilaĝojn sed neniam aŭdis, ke estas loko kun la nomo “Goŭjandong”. Li provis trovi la adreson tra la tuta urbo sed neniel sukcesis. Poste li skribis leteron al la adresanto por ke la lasta donu detalan adreson. Baldaŭ Long Ziging ricevis respondon kun la klarigo, ke la adresanto nomiĝas Huang Benĵong. Antaŭ la Liberiĝo, kiam li estis ankoraŭ kvarjara, li estis forrabita de banditoj kaj vendita en Huaĵong. Nun li disiĝis de siaj gepatroj ĉirkaŭ tridek jarojn, kaj li jam edziĝis kaj vivas feliĉe, tamen li konstante sopiris al la gepatroj longe neviditaj. Oni diris, ke ili loĝas ĉe iu loko en Giŝoŭ-gubernio, sed oni ne plu memoris la precizan adreson. Li multfoje petis helpon de aliaj sed ĉiuj klopodoj ne atingis la celon. Ĉi-foje li volis peti la lokajn respondecajn kamaradojn helpi lin.

La kamaradoj de la poŝtejo legis kaj relegis tiun leteron kaj profunde simpatiis kun Huang Benĵong pro lia dolora travivaĵo. Ili volis tuj trovi por la adresanto la gepatrojn, sed estis tre malfacile serĉi ilian loĝejon en tiel granda urbo kiel Huaĵong. Long Ziging decidis, ke li nepre agu laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ “**tutkore kaj tutanime servi al la popolo**”. Sub la helpo de la respondecaj kaj aliaj kamaradoj li notis ĉiujn nomojn de la vilaĝoj kun la finaĵo “-dong” kaj komencis intensan laboron. Li iris trans multaj montoj kaj de vilaĝo al vilaĝo. Pasis tri monatoj, tamen li akiris nenion informon. Kiam la Novjara Tago proksimiĝis, iuj kamaradoj diris al li kun zorgemo: “Maljuna Long, ripozu kelkajn tagojn kaj daŭrigu vian serĉadon post la Novjaro!” Sed Long Ziging respondis: “La ĉina proverbo diras, ke oni plej sopiras siajn parencojn en festtago. Kiel bone estus, se Huang Benĵong povus intervidiĝi kun siaj gepatroj je la Novjara Tago!” Kiel antaŭe li daŭrigis la serĉadon kaj fine trovis la gepatrojn de Huang-Benĵong en Daping-komunumo de Giŝoŭ-gubernio post duonjara klopodo. Tiu paro da maljunuloj jam aĝis pli ol sepdek jarojn. Eksciinte, ke ilia filo ankoraŭ vivas, ili tuj larmis de ĝoja emocio. La gepatroj prenis la manojn de kamarado Long kaj diris: “Dankon, koran dankon! En la malnova socio ni estis devigitaj forlasi nian hejmlokon, fariĝis almuzuloj kaj vivis mizere, Estas Prezidanto Maŭ kiu nin savis kaj ebligis al ni maljunuloj feliĉan vivon. Ni neniel atendis, ke nia filo ankoraŭ vivas sur la tero!” Long Ziging respondis: “Ne estas mi, kiun vi devas danki. Vi kaj mi ĉiuj devas danki Prezidanton Maŭ!”

# Karboskulptaĵo de Fuŝun

**K**IAM Samdek Norodom Sihanuk, la kamboĝa ŝtatestro, kaj lia edzino vizitis la urbon Fuŝun en Nordoriento de Ĉinio pasintjare, la urbanoj donacis al la gastoj skulptaĵon el grupo da homfiguroj nove faritan por esprimi sian subtenon kaj amikecon al la heroa kamboĝa popolo.

La skulptaĵo montras kamboĝan soldaton sturmantan el bananarboj, firme tenantan pafilon en la mano, kaj post li armeanojn kaj popolanojn, ĉiujn kun decidemo kaj preteco por bati la malamikojn. La skulptaĵo plene montris la ŝtalan volon kaj neatenceblan dignon de la kamboĝa popolo, kiu sentime, sinofere kaj heroe pretas batali kontraŭ la nacia malamiko.

La materialo de tiu skulptaĵo estis nek jado nek ŝtono sed karbo kiun produktas Fuŝun, fama karboproduktejo en nia lando.

La kandel-karbo (speco de bitumoza karbo) uzata por tiu celo estas brile nigra, malpeza, solida, kompakta kaj taŭga por skulptado. Antaŭ kvindek jaroj oni jam komencis produkti tiun metiartaĵon en Fuŝun.

Skulptaĵoj el tiu materialo estas bele okulplaĉaj, sukece brilantaj, subtile delikataj kaj karakterizataj per versimileco kaj simpleco. Sed antaŭe oni uzis ĝin nur por gravuri surtablajn uzaĵojn kiaj estas inkplato, penikujo, pipo, cindrujo, lamposoklo ktp. Pli poste oni skulptis birdojn kaj bestojn, sed malofte homfigurojn.

En la lastaj jaroj oni faris novajn paŝojn en skulptado de homfiguroj kaj jam atingis certajn sukcesojn en kunigo de la temo kun la arta formo. Aperis jam pluraj bonaj verkoj kiel *Transpreno de Tasko* spegulanta la laborfervoron de laboristoj en socialisma konstruado, *Lej Feng* kaj *Oŭjang Haj*\* prikantantaj heroajn personojn... kaj *La Justa Batalo de Nigruloj Nepre Venkos*, kiu spegu-



*Ministo*

las la heroismon de leviĝantaj nigruloj en Usono, kaj aliaj. En sia kreado, la karboskulptistoj uzas subtilajn tranĉojn por figuri homojn kaj larĝajn tranĉojn por formi lakone pejzaĝan fonon. La manipulado de la tranĉilo estas adaptata konvene al la kreaĵo, tiel ke estas plene elmontrita vivece la formo kaj fizionomio de la figuro. Kiuj vizitis la urbon Fuŝun kaj vidis la grandajn karboskulptaĵojn starantajn antaŭ la enirejo de la karbominejo, ĉiuj admiras ilin.

\**Lej Feng kaj Oŭjang Haj* ambaŭ estas heroaj figuroj de la juna generacio de Ĉinio.



LA Ŝenjang-a Akrobata Trupo de Ĉinio faris amikan viziton al Kanado, Usono, Ĉilio, Peruo kaj Meksikio, de novembro de 1972 ĝis marto de 1973. La vizito pliiĝis la amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj tiuj landoj, kaj donis al la ĉinaj akrobatoj multajn belajn memorindaĵojn neforgeseblajn.

AMIKECO

La akrobata arto de la nova Ĉinio aperis la unuan fojon sur scenejoj de Kanado, Usono kaj Peruo, kaj rikoltis varman bonvenigon ĉe la vasta spektantaro. La kanada ĝenerala gubernatoro Roland Michener kaj lia edzino kaj Ĉefministro Pierre Elliott Trudeau rigardis la unuan prezenton

de la ĉina akrobata trupo en Kanado. Post la finiĝo de la prezento, la ĝenerala gubernatoro kaj lia edzino kaj la ĉefministro ascendis la scenejon, varme manpremis kaj intime interparolis kun la ĉinaj akrobatoj. Ĝenerala Gubernatoro Michener diris: "Mi estas tre ĝoja, ke vi venis ĉi tien de Ĉinio kaj portis al ni amikecon."

Ĉiam, kiam la trupo faris prezenton en Kanado, la teatro estis plena de gaja kaj amika atmosfero. Kun granda intereso oni rigardis la akrobataĵojn de la nova Ĉinio kiaj la *Leon-dancon* kun forta nacia nuanco, malpeza kaj kolorriĉa *Telertornado*, lerta kaj eleganta *Ring-plonĝado*, bela kaj diversgesta *Pagodo de Bovloj*, kuraĝa kaj fortika *Longstanga*

*La akrobata trupo sin amuzas kune kun gelernantoj de la Dependenda Arta Lernejo de la Quebec-a Arta Centro de Kanado.*



# Vojaĝo en Ameriko

de JENJOŬ

*Artifiko*, vikleplena *Artifika Biciklado* ktp. Post la finiĝo de la prezentado, multaj rigardantoj amase venis sur la scenejon por manpremi kaj interparoli kun la akrobatoj. Ili diris: “Vi portas al ni ĝojon, amikecon kaj plezuron.”

En Usono, la akrobata trupo ricevis la varme gratulan leteron de Prezidanto Richard Nixon, kaj li kaj lia edzino akceptis la tutan akrobatan trupon en la Blanka Domo. Ĉe la akcepto, Prezidanto Nixon faris varman bonvenigon dirante: “Ni tre ĝojas ke ni oficiale bonvenigas vin ĉi tie en la Blanka Domo, kaj ni dankas al vi pro via brila prezentado en Usono.” Prezidanto Nixon ankoraŭ donis al ĉiu akrobato memoraĵon kaj varme interparolis kun ili.

La akrobatarto de la nova Ĉinio kaj la eminenta prezentado de la ĉinaj akrobatoj rikoltis akklamon kaj varman laŭdon ĉe la usonaj rigardantoj kaj gazetaro. La kortuŝa sceno ofte aperis kiam la trupo faris prezentadon en diversaj lokoj de Usono. La akrobatoj iam devis foje-refoje esprimi dankon pro la aklamoj eĉ ok fojojn. La amikeco sur la scenejo kaj en la partero kunfandiĝis kaj la manklakado kaj hurao sekvis unu alian. Foje kiam finiĝis iu prezentado en Novjorko, granda nombro da rigardantoj venis antaŭ la orkestro por rigardi la ĉinajn muzikilojn kaj longe ne volis foriri. Kaj kiam la ĉina orkestro ludis por ili kantojn kaj popolajn muzikaĵojn de Ĉinio kaj Usono, ili respondis per foj-refoja manklakado kaj laŭdado. En ĉiu prezento la akrobata trupo ĉiam komencis sian prologon per la standardo kun surskribo “Vivu la Amikeco inter la Popoloj” kaj finiĝis per la programero *Floroj de Amikeco*. Post rigardo, iu studento de la Nordokcidenta Universitato de Ĉikago diris al sia instruisto: “Dum la lekcio vi diris al ni, ke la ĉina popolo estas amiko de ni la usona popolo. Nun,

*La ĉina iluziisto vekis grandan intereson per sia “Fiŝhokado”.*





*Usonaj geamikoj de Vaŝingtono bonvenigas la ĉinan akrobatan trupon kun slogano skribita en la ĉina lingvo "Vivu la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Usono!"*

tion mi propraokule vidis en la prezentado de la Ŝenjang-a Akrobata Trupo."

La perua popolo donis grandan atenton al la unua vizitado de la ĉina arta trupo al Peruo. Aranĝite de la Tutlanda Kultura Asocio de Peruo, helikoptero disdonis super Limo materialon pri la programoj de la ĉina akrobata trupo. Por ke pli multaj ordinaraĵ laboruloj havu ŝancon aprezi la akrobatan arton de Ĉinio, la prezentado estis speciale farita en la granda sporta halo kaj la prezo de bileto estis malaltigita. La peruaj rigardantoj aparte laŭdis la kuraĝecon, lertecon kaj optimismon de la junaj ĉinaj akrobatoj. La patriotaj transmaraj ĉinoj en Peruo tre ĝojis pri la vizito de la akrobata trupo. Iu 70-jara transmara ĉino kortuŝiĝis ĝis larmo, kiam li rigardis la artan prezentadon de la trupo sendita de la patrolando la unuan fojon en fremda lando.

### "MI ŜATAS LA ĈINAN POPOLON"

La profunda amikeco de la popoloj de tiuj vizititaj landoj al la ĉina popolo profunde impresis niajn akrobatojn. Kiam la akrobata trupo faris prezentadon en Montrealo de Kanado, iu paralizita verkisto veturis en ĉareto puŝita de sia edzino al la teatro por rigardi la prezentadon. Por

pli bone koni Ĉinion, tiu ĉi verkisto komencis lerni la ĉinan lingvon en libera tempo jam antaŭ kvar jaroj. Li varme laŭdis la prezentadon de la ĉinaj artistoj. Post finiĝo de vespera prezentado, du kanadaj amikoj piediris al la hotelo loĝata de la ĉina trupo spite de neĝego kaj faris intiman interparolon kun ĉinaj akrobatoj. En la urbo Quebec, la akrobata trupo ricevis leteron de kanada amiketo, kiu diris: "Mi tre ŝatas vian prezentadon kaj esperas ke vi baldaŭ venos refoje."

En Usono, ĉu en teatro aŭ en akcepta kunveno, ĉu sur strato aŭ en fabriko kaj kamparo, la usonaj amikoj ĉiam intime salutis al, varme manpremis kaj amike interparolis kun la ĉinaj gastoj, tio montris ke pliiĝi la amikecon inter la popoloj de la du landoj estas deziro de la usona popolo. En Ĉikago, iu maljunulino diris al ĉinaj akrobatoj: "Kiam la Ĉina Tablotenisa Teamo venis, mi ŝatas ĉiun el ili. Nun vi venas, mi ŝatas ankaŭ vin. Mi ŝatas la sepcent-milionan ĉinan popolon, kvankam mi neniam vizitis Ĉinion." En ĉiu urbo kien la akrobata trupo vizitis, ĝi ofte renkontiĝis kun iuj amikoj kiuj iam vizitis Ĉinion. La amika interparolado vekis ilian belan rememoron pri Ĉinio. En Novjorko, multaj usonaj amikoj kiuj vizitis Ĉinion portis ĉinan veston por rigardi la pre-

zentadon. En Novjorko iu knabo Riukin estas 11-jara same kiel iu ĉina akrobateto. Ili renkontiĝis tri fojojn. La usona knabo donacis al la lasta koloran foton de sia tuta familio kun sia subskribo tradukita de iu en la ĉinan lingvon: "Mi tre ŝatas vian leon-dancon kaj esperas ke ni usonaj kaj ĉinaj amiketoj kune kreskigos la amikecon." Tio plene montris la sinceran deziron de la usona popolo amikiĝi kun la ĉina popolo de generacio al generacio.

La prezentado pliprofundigis ankaŭ la amikecon de la ĉilia, perua kaj meksikia popoloj al la ĉina popolo. Kiam la ĉina akrobata trupo faris prezentadon en diversaj lokoj de Ĉilio, la ĉiliaj amikoj esprimis sian amikecon al la ĉinaj senditoj ĉiam per diversaj manieroj. Ĉiufoje kiam finiĝis la prezentado, rigardantoj amase venis al la scenejo kaj intime interparolis kun ĉinaj artistoj ilin ĉirkaŭante. Kiam la akrobata trupo atingis Limon, la ĉefurbon de Peruo, la peruaj amikoj konkurete tendis sian manon al la ĉinaj gastoj kaj donis bukedaĵon post bukedaĵo da freŝaj floroj. La Tutlanda Kultura Asocio de Peruo, kiu respondecis pri la akcepto al la ĉina akrobata trupo, aranĝis prezentadon de naciaj kantoj kaj dancoj sur la aerodromo por la ĉinaj gastoj. Sur la tero de tiu "lando de suno", la ĉinaj akrobatoj ĉiam sentis varmon de amikeco. Dum akcepto de la malproksimaj gastoj la gastamaj meksikanoj ofte diris: "Jen estas via hejmo!" La akrobata trupo ja vere sentis Meksikion sia hejmo.

## GAJA RENKONTIĜO

En Ĉilio, la ĉinaj gastoj travivis multajn neforgeseblajn noktojn. Vespere post finiĝo de la unua prezentado en Santiago, grupo da ĉiliaj artistoj de la folkloro baletto "Aŭkaman", en freŝkoloraj naciaj kostumoj, ascendis la scenejon kaj varme gratulis la ĉinajn akrobatojn per ĉilia popoldanco. Tio plivigligis la gajan kaj amikan atmosferon en la teatro. La vizito al Sumar-ŝpinteksejo estis aparte intima por la ĉinaj akrobatoj. Tiu-tage, prezidanto Salvador Allende Gossens inspektis la fabrikon. La prezidanto faris ekstreme varman parolon en la laborista manĝejo por bonvenigi la ĉinan trupon, kaj invitis la ĉinajn gastojn kune preni manĝon. Dum la manĝado, iu ĉilia laboristo iam vizitinta Ĉinion laŭte kantis *Ruĝas la Oriento* en la ĉina lingvo, kaj la akrobata trupo prezentis programerojn. Je la disiĝo, la laboristoj amase akompanis la ĉinajn akrobatojn al la aŭto, kaj ilin adiaŭis kun bedaŭro.

En Meksikio Prezidanto Luis Echeverria Alvarez rigardis la prezentadon de la akrobata trupo kune kun sia tuta familio kaj plejparto de la kabinetaj ministroj. Tuj post la finiĝo de la prezentado, kiam nia ambasadoro en Meksikio okazigis akcepton, la prezidanto manpremis kaj intime interparolis kun la ĉinaj artistoj ankoraŭ en akrobataj vestoj kaj donis al ili donacojn. Je la fino de la akcepto, la prezidanto kaj lia edzino eliris el la salono, intime prenante manon de akro-



Ĉinaj kaj ĉiliaj artistoj ĝoje renkontiĝas.



*La akrobata trupo prezentas artifikan bicikladon en la mezlernejo "Ĉina Popola Respubliko" en antaŭurbo de Meksiko.*

batetoj. Neforgeseblaj por la ĉinaj akrobatoj estis ankaŭ la du tagmezoj kiujn ili trapasis en la rezidejo de la prezidanto. En la 28-a de februaro, dum la akcepto de Prezidanto kaj Sinjorino Echeverria, la amikeco inter Meksikio kaj Ĉinio kaj lia baldaŭa vizito al Ĉinio fariĝis ĉefa temo. Prezidanto Echeverria diris: "Ni rigardas la Ŝenjang-an Akrobatan Trupon kiel delegacion de amikeco. Ĝuste kiel via programero *Floroj de Amikeco*, ni vizitos Ĉinion ankaŭ kun tiaj floroj." Tiuj vortoj sonis tre intimaj al la ĉinaj akrobatoj. En la 5-a de marto, sur la verda muzika gazono de vilao "Pinaro", la rezidejo de la prezidanto, Sinjorino Echeverria plezure konatigis al la ĉinaj gastoj tri lernantinojn lertajn en ŝnura artifiko kaj du instruistinojn ĉelokajn laŭ ŝia invito. La tri malgrandaj lernantinoj estis speciale venintaj por renkontiĝi kun la ĉinaj akrobatoj. Sub la meksikiana muziko, ili prezentis diversgestan belan ŝnurarton kun aparta nacia stilo. Ankaŭ ĉinaj akrobatinoj ludis simplan magion. Meksikiaj kaj ĉinaj amikoj instruis unu alian kaj lernis unu de alia tuj ĉeloke kaj iliaj agrablaj ridoj ŝvebis super la pinaro.

La duan vesperon post kiam la akrobata trupo atingis Limon, la ĉefurbon de Peruo, la ĉinaj ak-

robatoj renkontiĝis, en la kvietaj sidejoj de la Lima filio de Hinhua-novajagentejo, kun la peruaj amikoj de muzika rondo. La perua kantistino Tania kantis la peruan popolan kanton *Defendi la 200 marmejlojn*. La kanto esprimas la nacian fiercon de la peruaj popoloj kiuj amas sian patrion, kaj ricevis varman bonvenigon de la ĉinaj akrobatoj. Ŝi ankaŭ instruis la ĉinajn akrobatojn kanti *Mian Peruon* vorto post vorto. La prezidanto de la Perua-Ĉina Kultura Asocio kaj lia edzino ludis peruan antikvan *Mararmean Dancon* por la ĉinaj gastoj. Tiuj kantoj kaj danco spegulas la volon kaj gloran batalan tradicion de la perua popolo en defendado de la teritoria maro. En tiu gaja renkontiĝo, ankaŭ la ĉinaj akrobatinoj kantis ĉinajn kantojn por la peruaj amikoj. La dulandaj amikoj intime interbabilis pri muziko kaj la tradicia amikeco inter la dulandaj popoloj. La renkontiĝo finiĝis en la tre intima atmosfero.

Kiam la akrobatoj de la Ŝenjang-a Akrobata Trupo forlasis la amerikan kontinenton, rigardante el la aviadilaj lukoj la bolantan maron, ili rememoris la amikajn kaj entuziasmajn vizaĝojn kaj kun emocio refoje adiaŭis al la gastamaj mastroj: Ĝis revido, niaj amikoj!



# Londona Filharmonia

## Orkestro en Ĉinio

**G**EAMIKOJ de la Londona Filharmonia Orkestro venis al Ĉinio de fore en la 17-a de marto, 1973, por amika vizitado.

Eric Bravington, administra direktoro de la orkestro, diris al ĉinaj geamikoj: "La membroj de la Londona Filharmonia orkestro sopiris ĉi tiun viziton jam antaŭ longe." Li esperis ke tiu ĉi vizito faros utilan kontribuon por pliigi la amikecon kaj kulturen interŝanĝon inter la popoloj de Britio kaj Ĉinio. Multaj el la membroj esprimis ankaŭ grandan ĝojon pro la ŝanco.

Per siaj eminenta arto, okulfrapa stilo kaj varma amikeco al la ĉina popolo la orkestro profunde impresis la ĉinajn aŭskultantojn en ĝia mallonga prezentado en Pekino.

La Londona Filharmonia Orkestro estas renoma pro sia prezento de klasikajoj. Ili prezentis *Uverturon*, *Cockaigne* ("en Urbo Londono"), de la brita komponisto Edward Elgar, *Simfonion N-ro 7 en A* de Ludwig van Beethoven, *Konĉerton por Violono kaj Orkestro en D* de Johannes Brahms, *Simfonion N-ro 8 en G* de Anton Dvorak k. a. Direktisto John Pritchard faris per sia majstra direktado ĉiun muzikajon harmonia tuto. La unua violonisto Rodney Friend kaj violona solistino Ida Haendel elmontris sian elstaran teknikon kaj okulfrapan

stilon de ludarto. Iliaj ludoj rikoltis varman manklakadon ĉe la aŭskultantoj. Por esprimi sian amikecon al la ĉina popolo, la britaj artistoj ludis aparte pecon *La Gajaj Soldatinoj* el la moderna revolucia baledo *Ruĝa Virina Taĉmento*. La lerta tekniko kaj sincera amikeco gajnis la koron de la ĉinaj aŭskultantoj, kaj rikoltis varman, amikan kaj longdaŭran manklakadon.

En la 20-a de marto, nia Centra Filharmonia Societo kaj la Londona Filharmonia Orkestro kune sin amuzis per muziko. Ĉinaj artistoj prezentis kantojn komponitajn laŭ poemoj de Prezidanto Maŭ kaj la fortepianan konĉerton *La Flava Rivero*, kiuj rikoltis varman aplaŭdon de la britaj amikoj. La britaj artistoj aprezis kun granda intereso ankaŭ bivan solon kun ĉina tradicia karakterizaĵo verkita antaŭ pli ol 500 jaroj. Post la prezentado, la britaj amikoj amase ascendis la scenejon por manpremi, varme interparoli kaj interŝanĝi sperton kun la ĉinaj kolegoj. Tio montris la profundan amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj Britio.

La mallonga vizitado pliigis la interkomprenon kaj amikecon. La direktisto de la orkestro esperis, ke ĝi havos pli da ŝancoj por prezenti al la ĉina popolo kaj kredis ke la brita popolo certe tre ĝojos kiam ili aŭskultos la de ili kunportitajn ĉinajn muzikaĵojn.

La Londona Filharmonia Orkestro en Pekino



# Ekspozicio de Verkoj de Japana Pentristo

## Hokusaj Kacuŝika en Pekino

**N**ELONGE post la restariĝo de diplomaciaj rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio, okazis en Pekino Ekspozicio de Verkoj de Japana Pentristo Hokusaj Kacuŝika (1760-1849), en marto kurantaj. Ĝi ricevis varman akcepton kaj laŭdon.

Hokusaj Kacuŝika estas fama japana pentristo de ĝenro, kiu prezentas ĉiutagan vivon de la popolo. En la ekspozicio estis ekspoziciitaj pli ol 150 el liaj verkoj, kiuj bildigis la tiaman vivon kaj laborojn de la japana popolo kaj pejzaĝojn.

Tiu ĉi ekspozicio ebligis al la ĉinaj spektantoj vidi pli multe da valoregaj originalaj pentraĵoj kaj lignogravuraĵoj de tiu ĉi pentristo. La temoj de liaj verkoj estas ampleksaj. Troviĝas en liaj pentraĵoj floroj, birdoj, fiŝoj kaj insektoj, kaj ankaŭ pejzaĝoj kaj homfiguroj. Majstraj estas liaj delikataj pentraĵoj kaj skizoj. Tio montras lian specialan talenton en pentrado.

La fama pentristo estis adoptita filo de iu lensfaristo. Junaĝe li laboris en libro-pruntodonejo kiel komizo, kiu iris ĉiuloken por liveri kaj repreni librojn. Liaj karikaturaj kaj skizaj priskribantaj la laborantan popolon estas tre lerte faritaj kaj vivsimilaj. El tio oni povas vidi, ke la pentristo amas la laborantan popolon, kaj liaj pentraĵoj vekas kunsenton ĉe la spektantoj. Kaj lia stilo karakterizata de populareco estas ŝatata de la popolo.

La pentraĵoj de tiu ĉi ekspozicio estas liveritaj de la Japana Plenuma Komitato de tiu ĉi ekspozicio, Japana-Ĉina Kultur-interŝanĝa Asocio kaj Nippon Keizai Ŝimbun (Japana Ekonomia Ĵurnalo). Tiu ĉi ekspozicio utilas ne nur al disvolviĝo de la kultura interŝanĝo kaj tradicia amikeco inter Ĉinio kaj Japanio, sed ankaŭ al la kompreno de la ĉina popolo pri la vivo de la japana popolo kaj krome ankaŭ riĉigis ĝian artan vivon.



*En la Ekspozicio de Verkoj de Japana Pentristo Hokusaj Kacuŝika en Pekino*

# Ekspozicio de Brita Industria Teknologio

**L**A Ekspozicio de Brita Industria Teknologio okazis en Pekino, de la 26-a de marto ĝis la 7-a de aprilo. Ĝi montris al la vizitantoj progreson kaj atingojn de brita industrio.

La ekspozicio grandskala kaj sinteza estis okazigita de la Ministrejo por Komercio kaj Industrio de Britio kaj la Ĉina-Brita Komercia Konsilantaro. Ĝin partoprenis pli ol 340 fabrikoj de Britio. La ekspoziciaĵoj konsistis ĉefe el produktaĵoj de aviada kaj aŭta industrioj, ilmaŝinoj, elektronaj objektoj, sciencaj instrumentoj, ekipaĵoj de kemiaj fabrikoj, minejoj kaj elektrejoj k.a. La ekspozicio ampleksis areon de 14,000 kvadrat-metroj.


Ĉefministro Ĝou Enlaj intervidiĝis kaj faris amikajn interparolojn kun britaj gastoj, inter kiuj troviĝis Peter Walker, ministro por komercio kaj in-

dustrio, kaj S-ino Walker, Michael Heseltine, ministro por aviado kaj navigado, kaj S-ino Heseltine, kaj John Keswick, prezidanto de la Ĉina-Brita Komercia Konsilantaro kaj de la ekspozicio. Ili estis invititaj de nia lando por amika vizito kaj partoprenis la ceremonion de la ekspozicio.

La ekspozicion vizitis gvidantoj de nia registaro: Ĝou Enlaj, Li Hiannian, Gi Pengfej, Ju Kiuli, Baj Hianguo kaj Vu De.

Dum la ekspozicio, okazis prelegoj kaj diskutoj pri multflankaj teknikoj, kaj ankaŭ kunsidoj teknologiaj inter la teknikistoj de Ĉinio kaj Britio.

Tiu ĉi ekspozicio pliapaŝe akcelis la reciprokan komprenon kaj amikecon inter la ĉina kaj brita popoloj kaj helpas disvolviĝon de ekonomiaj kaj komercaj rilatoj inter la du landoj.



## NOVAJ VERKOJ DE ĈJUJIO

*Ĉjuji-o* estas tradicia popola arto de Ĉinio. Ĝi jam havas historion de pli ol mil jaroj. Ĝi devenas de rakontoj kaj polkantoj kaj hodiaŭ jam ekzistas pli ol 260 specoj de *ĉjuji-oj*.

La novaj programeroj lastatempe prezentitaj de la Pekina Ĉjuji-a Trupo estas vivecaj kaj spirantaj intensan vivon. Per simplaj formoj de rakontado kaj

kantado, ili laŭdas la spiritan fizionomion de la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj grandpaŝe antaŭenmarŝantaj vivecplene sub la gvido de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj prikanthas la sukcesojn de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando. En sia prezentado, la *ĉjuji-aj* laborantoj donis apartan atenton al skulptado de pozitivaj herooj, kaj en aranĝado de la melodioj ili kaj konservis la proprajn karakterizaĵojn de la koncernaj specoj de *ĉjuji-o* kaj faris kuraĝajn reformojn kaj kreaĵojn de novaĵoj. Tiuj novaj *ĉjuji-aj* programeroj estas varme akceptitaj de la amasoj.

# Nova Monkrizo en Kapitalisma Mondo

**N**OVA monkrizo en la kapitalisma mondo komenciĝis je la lasta tagdeko de januaro, 1973, kiam granda sumo da usonaj dolaroj estas forvendita por la okcidentgermana marko kaj la japana jeno en la moninterŝanĝaj merkatoj de diversaj okcidenteŭropaj landoj kaj Japanio. Sub la frapo de tiu fortega ŝtormo, la kapitalisma mona sistemo kun la usona dolaro kiel sia kerno fariĝis ankoraŭ pli ŝanceliĝa kaj la daŭra mona kaj financa krizo de la kapitalisma mondo pli rapide akriĝis.

Okcidentaj ĵurnal-servoj raportis ke en la unuaj 10 tagoj de februaro ĉ. 10,000 milionoj da dolaroj estis forvenditaj en la financaj centroj de la kapitalisma mondo. Sole en la moninterŝanĝaj merkatoj de Frankfurt, GFR, en la 9-a de februaro, forvendiĝis preskaŭ 2,000 milionoj da dolaroj, t.e. la plej alta cifero en la okcidenteŭropaj merkatoj depost la lasta tagdeko de januaro. En la sama tago, dolarovendo atingis ankaŭ novan kulminon en ĉefaj moninterŝanĝaj merkatoj de Londono, Parizo, Bruselo kaj Tokio.

Okcidenta Germanio alfrontis la plejfortan ŝtormon de la mon-krizo. Por teni la valutan proporcion inter marko kaj dolaro, la federacia banko de la Okcidenta Germanio estis devigita aĉeti 1,000 milionojn da dolaroj en la 1-a kaj 2-a de februaro. En urĝa kabineta kunveno en la 2-a, februaro, la registaro de GFR decidis alpreni plian paŝon por kontroli monan interŝanĝon kun eksterlandaj monoĵoj. Tamen, tio ne povis haltigi la enflon de dolaroj en GFR-n. Laŭ raporto, en la unuaj naŭ tagoj de februaro, la federacia banko de la Okcidenta Germanio devis aĉeti ĉ. 6,000 milionojn da dolaroj. Kanceliero de GFR Willy Brandt okazigis alian urĝan kunvenon de la kabineto en la 9-a de februaro por trovi rimedojn kontraŭ la situacio. En la sama tago, Brandt telefonis al usona prezi-

danto Richard Nixon, franca prezidanto Georges Pompidou kaj brita ĉefministro Edward Heath aparte pri la mon-krizo. En la sama vespero, Helmut Schmidt, financa ministro de GFR, veturis al Parizo por okazigi urĝan kunvenon kun franca financa ministro Valery Giscard d'Estaing kaj brita kanceliero de la fisko Anthony Barber provante trovi komunan starpunkton kontraŭ la krizo de la usona dolaro.

Kiam la moninterŝanĝaj merkatoj de okcidenta Eŭropo dronis en ĥaoso, streĉeco estiĝis ankaŭ en Japanio. Post kiam la aŭtoritatoj de GFR prenis pliajn paŝojn por kontroli moninterŝanĝon kun eksterlandaj monoĵoj en la 2-a de februaro, tuj en la sekvanta tago estiĝis tajdo forvendi usonajn dolarojn por la japana jeno en la tokia merkato, kaj la oficiala interŝanĝa kurzo de la dolaro foje-refoje falis ĝis ĝia malsupra nivelo. Por teni la valutan proporcion inter dolaro kaj jeno, la banko de Japanio devis aĉeti 280 milionojn da dolaroj nur en duontago de la 3-a de februaro. Kaj ĝis la 9-a de februaro, la banko de Japanio jam aĉetis totale pli ol 1,100 milionojn da dolaroj. En tia cirkonstanco, la japana registaro anoncis fermiĝon de la tokia merkato por moninterŝanĝo kun eksterlandaj monoĵoj.

La kaŭzo de tiu ĉi monkrizo de la kapitalisma mondo kuŝas ankoraŭ en la malforta pozicio de la usona dolaro rezulte de la grandegaj deficitaj de internacia pagado de Usono en sinsekvaj jaroj. De la jaro 1960, la krizo de dolaro frekvente okazis. La malforta pozicio de la dolaro havis neniun pliboniĝon en pli ol unu jaro post kiam la interkonsento pri reĝustigo de moninterŝanĝaj proporcioj kaj aliaj paŝoj estis faritaj inter la dek ĉefaj okcidentaj landoj ĉe la Vaŝingtona Kunveno en decembro, 1971. La usona inflacio pluapaŝe disvolviĝis

en 1972. La kvanto de mona provizo de Usono kreskis je 11 procentoj, atinginte 246,800 milionojn da dolaroj ĝis la jarfino. La budĝeta defcito de la usona registaro por fiska 1973 (de la 1-a de julio, 1972, ĝis la 30-a de junio, 1973) estis 24,800 milionoj da dolaroj. La defcizio de la usona ekstera komerco atingis 6,440 milionojn da dolaroj en 1972, triobligante tiun en 1971, kaj fariĝis la plej alta rekordo en la historio. Ĉio ĉi tio pluapase skuis la kreditecon de la dolaro, kaj la dolartenantoj fariĝis pli maltrankvilaj.

Sub la furioza atako de mon-krizo en la kapitalisma mondo, la usona registaro deklaris vespere de la 12-a de februaro devaluton de la dolaro je 10 procentoj. Tio estis la dua fojo en la 14 monatoj post ĝia unua devaluto en la meza tagdeko de decembro, 1971.

Post la devaluto de la dolaro, multaj landoj reĝustigis sian moninterŝanĝan proporcion kontraŭ la usona dolaro aŭ adoptis variantajn proporciojn. Iuj landoj ankaŭ anoncis devaluton de siaj monoj. Svedio kaj Finnlando deklaris devaluton de sia mono je 5 procentoj en la 15-a de februaro. Ankaŭ Indonezio, Irano, Kenjo, Ugando, Tanzanio, Honduraso kaj Salvadoro sinsekve devalutis siajn monojn je 10 procentoj. Kvankam aliaj landoj inkluzive de la Germana Federacia Respubliko, Francio, Belgio, Danlando, Norvegio ankoraŭ tenas norman valoron de siaj monoj, tamen ili efektive plivalorigis sian monon je 11.1 procentoj post la reĝustigo de iliaj moninterŝanĝaj proporcioj kontraŭ la devalutita dolaro.

La devaluto de dolaro kaj la ĥaoso en la monaj merkatoj de la kapitalisma mondo kaŭzis rapidan leviĝon de la prezo de oro. En la 14-a de februaro,

la dua tago post la devaluto de la usona dolaro, sur la libera moninterŝanĝa merkato en Londono, orprezo altiĝis ĝis 72.5 usonaj dolaroj po unco, kaj en la 19-a de februaro jam ĝis 75.75 dolaroj. Sole en la 21-a de februaro, la orprezo en Londono plialtiĝis 3 dolarojn kaj formis novan kulminon de 79.37 dolaroj po unco ĉe la fermiĝo. Kaj en Zuriko, ĝi atingis 80.05 dolarojn po unco, kun kresko de pli ol 20 procentoj kompare kun 65 dolaroj po unco en la komenco de la mon-krizo. La konkura aĉeto de oro en la okcidenta Eŭropo pruvis ne nur la pluan malleviĝon de krediteco de la usona dolaro sed ankaŭ tion, ke la lasta reĝustigo pri moninterŝanĝa proporcio tute ne solvis la longdaŭran monkrizon.

Ĝuste tia estis la fakto.

Sekve de tio, aperis alia forvendo de la dolaro por la okcidentgermana marko, kaj la mon-krizo eniris en novan akran stadion. En la 1-a de marto, kiam kanceliero de GFR Willy Brandt atendis britan ĉefministron Edward Heath por kunsido pri financo kaj ekonomio, li diris al ĵurnalistoj: "La banko devis aĉeti 2,700 milionojn da dolaroj hodiaŭ. Tio estis neniam okazinta antaŭe en iu ajn loko de la mondo." En la 2-a de marto, preskaŭ ĉiuj eŭropaj merkatoj por moninterŝanĝo kun eksterlandaj monoj deklaris fermiĝon. La stato montris ke plejparto de eŭropaj landoj preferas ĉesigi portempe moninterŝanĝon sed ne riski enflon de la nebezonataj dolaroj.

Sekve de la senĉesa akriĝo kaj profundigo de la mon-krizo en la kapitalisma mondo, nun la okcidenta mondo eniras en periodon de granda financa ŝanceliĝo kun serioza rezulto por nacia ekonomio.

## Referenca Materialo

### Krizoj de la Usona Dolaro

Post la Dua Mondmilito, al la usona dolaro okazis jenaj naŭ krizoj:

**La unua:** Post la agresa milito kontraŭ Koreio lanĉita de la usona imperiismo en la jaro 1950, al Usono aperis defcitoj de internacia pagado kaj en oktobro de 1960 eksplodis la unua grandskala krizo de la usona dolaro post la milito. Por sin savi el la krizo, Usono kune kun la sep okcident-eŭropaj landoj organizis "ĝeneralan kason de oro",

kaj aĉetis kaj vendis oron sur merkato, por ke la prezo de oro estu stabila sur la usona oficiala nivelo de 35 dolaroj kontraŭ unu unco.

**La dua:** Post kiam la usona imperiismo plivas-tigis la agresan militon kontraŭ Vjetnamio en la mezo de la sesa jardeko, ĝiaj pli kaj pli malboniĝantaj financa krizo kaj defcitoj de internacia pagado kaŭzis multan elfluon de la dolaro. En marto de 1968, okazis krizo de la dolaro senprecedenca

post la milito. Dum pli ol duonmonato, el la ora rezervo de Usono elfluis 1,400 milionoj da dolaroj, tiel ke Usono devis ŝanĝi sian oficialan prezon de oro en londona merkato en du prezojn sur du merkatoj. Unu el la du merkatoj estis oficiala, laŭ kies orprezo rajtas interŝanĝi de Usono oron per dolaroj nur fremdlandaj centraj bankoj; la alia estis libera, kies prezo de oro kontraŭ la usona dolaro libere varias laŭ provizo kaj postulo. Tio efektive estis devaluto de la usona dolaro.

**La tria:** En la meza tagdeko de novembro, 1968, oni diris ke la okcidentgermana marko baldaŭ sin plivalorigos dum la franca franko devalutiĝos, tiel sur la okcidentaj monaj merkatoj aperis forvendo de franko, pundo kaj dolaro por oro kaj la okcidentgermana marko.

**La kvara:** En aprilo de 1969, cirkulis onidiro ke franko devalutiĝos, tiel sur la okcidentaj monaj merkatoj aperis konkura forvendo de franko, pundo kaj dolaro por oro kaj la okcidentgermana marko. Tio donis pezan baton samtempe al la dolaro, franko kaj pundo.

**La kvina:** En septembro, 1969, eksplodis sur la okcidenteŭropa kaj usona monaj merkatoj alia ŝtormo de forvendo de la dolaro, pundo kaj franko por la okcidentgermana marko. GFR devis fermi sian moninterŝanĝan merkaton kaj efektivigis la t.n. "sistemon de variantaj moninterŝanĝaj proporcioj". En oktobro de la sama jaro, la registaro de GFR devigite deklaris plivalorigon de marko je 8.5 procentoj, kio altigis la interŝanĝan proporcion ĝis 3.66 markoj (anstataŭ 4 markoj) kontraŭ unu dolaro.

**La sesa:** En majo de 1971, kaŭze de seriozaj krizoj de usonaj financo kaj ekonomio, nenormala inflacio, akra malboniĝo de internacia pagado

kaj senĉesa malfortiĝo de la dolara pozicio, aperis sinsekve sur la ĉefaj okcidenteŭropaj monaj merkatoj grandsuma forvendo de la dolaro por oro, la okcidentgermana marko k. a. okcidenteŭropaj monoj. Tiufoje la usona dolaro fariĝis la sola forvendita mono. Furioze altiĝis la prezo de oro, forte malaltiĝis la valoro de dolaro kaj ĥaoso regis la ĉefajn okcidenteŭropajn monajn merkatojn.

**La sepa:** En la fino de julio ĝis la komenco de aŭgusto, 1971, pli kaj pli akriĝis la usona financa kaj ekonomia krizo. La budĝeta deficitado de la fiska 1971 altiĝis ĝis 23,200 milionoj da dolaroj, kaj la deficitado de internacia pagado en la unua duono de la jaro 1971 atingis 8,300 milionojn da dolaroj, kio estis senprecedenca en la usona historio. Ĝia ora rezervo malgrandiĝis ĝis 10,500 milionoj da dolaroj, per kiuj Usono povis pagi nur kvinonon el sia ŝuldo de 53,300 milionoj da dolaroj. Sekve de la maja krizo de 1971, aperis alia pli forta krizo de dolaro en la lasta tagdeko de julio. Tio devigis la usonan registaron anonci en la 15-a de aŭgusto apliki la "novan ekonomian politikon", ĉesigi interŝanĝon de oro el Usono per la usona dolaro fare de la fremdlandaj centraj bankoj. Kaj en la meza tagdeko de decembro samjara Usono decidis devaluti la interŝanĝan proporcion de dolaro kontraŭ oro je 7.89 procentoj, t.e. 38 dolaroj (anstataŭ la antaŭe difinitaj 35 dolaroj) kontraŭ unu unco da oro. Tio estis la unua fojo post la jaro 1934, ke Usono oficiale deklaris devaluton de la dolaro.

**La oka:** En junio de 1972, la krizo de pundo devigis la britan registaron anonci la liberajn variantajn proporciojn de pundo en monaj merkatoj. Sekve de tio, aperis denove ŝtormo de forvendo de la dolaro por oro.

**La naŭa** estas la nuna.



# Kanto de Migrantaj Montanoj

(prozo)

EN nia lando cirkulas multaj popolkantoj de sinceraj sentoj. Ili estas ne nur artaj trezoroj, sed ankaŭ plejparte miniaturoj de la vivo kaj de la historio.

Nun mi rakontu al vi la historion de iu popolkanto!

## I

En la jaro 1956, kiam mi venis al monto kun jaŭ-aj loĝantoj en la provinco Junnan por kolekti popolkantojn, aperis antaŭ mi 16-jara knabino, kvieta kiel verda arbaro, majesta kiel blua monto, fleksebla kaj forta kiel liano, vivanta en arbaro sur alta monto. Ŝi, nomata Pan Himej, estis lernantino de gubernia nacieca gimnazio kaj membro de la Komunisma Junulara Ligo. Ŝi kantis por mi la "Kanton de Migrantaj Montanoj". Kantinte ŝi rakontis al mi kun larmoj la devenon de tiu kanto:

... Kial oni nomis nin migrantaj jaŭaj montanoj? En la malnova socio, ni, simile al sennestaj kukoloj, flugis ĉijare tiun monton, alijare alian monton, migris kaj migris de monto al monto! Printempe, onkloj kaj fratoj, onkloj kaj fratinoj kun infanoj en korboj surdorse iris unuj post aliaj... al sovaĝaj montoj. Laŭ la takto de la pezegaj paŝoj, ili kantis:

*Migrad' de mont' al monto.  
Ĉiam pli krutajn montojn vidas migraj l' rondoj.  
Rompiĝas eĉ bastono bronza kaj sandaloj  
ferdrataj frotruiĝas pro la ŝtonaj baroj.  
Kaj sang' kaj larm' gutadas sur herbfolioj  
kaj ne sekiĝas eĉ post tri senpluvaj jaroj.  
Trans mont' post montoj iras jaŭoj en montaro.  
Ja kiam venos fino de ĉi tiu faro?*

Ni kantis kaj kantis... kun sono saturita je maldolĉo kaj ĉagreno.

Atinginte iun lokon, ni starigis pajlajn budojn, kaj poste tuj hakis kaj forbruligis sovaĝajn vegetalojn surmonte. Ni plantis piceidojn kaj, enpikinte la tersurfacon inter la piceidaj vicoj per tranĉilo, semis maizon. Ĉion ĉi tion ni faris por vampiro, la montmastro. Aŭtune, kiam maturiĝis la maizo, ni devis doni al li 6 aŭ 7 dekonojn de la rikoltaĵo kaj restis por ni nur malmulte, per kio ni devis pasigi kun larmoj tutan vintron. Post du tri jaroj, ni ne plu povis kulturi maizon, ĉar plenkreskis la piceidoj. Kaj la forstoj devis esti senpage donitaj al la montmastro. Ho, piceoj, piceoj, ni plantis vin, kulturis vin, sed ni ne estas viaj mastroj! Ni devis migri denove, foren, foren, al pli fora sovaĝa monto...

Tiun kanton mi notis. Mi zumis ĝin kaj la koro kovriĝis de pluva nubo. Kiam mi fermis la okulojn, tuj aperis antaŭ mi tragikaj scenoj de Jaŭnaciaj fratoj migrantaj en montaro.

Rimarkinte mian morozon Pan Himej diris: "Mi ne devus kanti al vi la Kanton de Migrantaj Montanoj. Tiel malĝoja ĝi estas ke larmus eĉ arboj ĝin aŭdinte." "La mizerego," daŭrigis ŝi, "kvazaŭ akvo malsupren fluanta de sur monto, neniam revenos. Ni liberiĝis, kaj la tuta montaro de jaŭoj baniĝas en brilo de la ruĝa suno. La jaŭaj montanoj ne plu bezonas migradi de monto al monto. Ĉiuj ili havas sian propran monton, proprajn arbojn kaj domojn." Ŝi diris: "Venu al nia vilaĝo, kamarado Li, kaj aŭskultu niajn novajn kantojn, tiel multajn kiel la arboj sur la blua monto!"

Mi akceptis ŝian inviton.

Ekvojaĝante mi demandis Pan Himej: Kiel longa estas la distanco? Ĉu la vojo estas facila? "Kvardek lioj, vojo glata," ŝi respondis. Tamen tricent paŝojn for de la gubernia urbeto oni jam devis ascendi monton. Pado, kvazaŭ liano, ser-



pentumas inter nuboj. “Ĉu tia vojo estas glata?” mi miris. “Kial ne?” kontraŭdemandis Pan Himej kun pli granda miro. En la okuloj de jaŭaj montanoj vojo, kiel ajn kruta kaj danĝera ĝi estu, estas glata, se nur ne troviĝas sur ĝi senordaj ŝtonoj, arabaj stoploj kaj dornoj. Kaj mi parolis al ŝi pri glata vojo en la vera senco: pri intervilaĝaj larĝaj vojoj sur la nord-ĉinia ebenaĵo, pri asfaltaj ŝoseoj borderitaj per poploj kaj pri la larĝa Ĉang-an-strato antaŭ la pordego Tian-anmen.

Kun duonfermitaj okuloj Pan Himej avide aŭskultis kaj ekkriis: “Kiel bonege, se tia vojego aperos ankaŭ sur la montaro de jaŭoj!”

Kiam falis vespera krepusko, ni eniris en Laĝukoŭ, nove konstruitan vilaĝon post la Liberiĝo ĉe montfaŭko kontraŭ profunda valo. Dek kelkaj surfostaj domoj sidas sub branĉoj kun verdaj folioj. La domo de Pan Himej kaj ŝia avo, Avo Ferulo, situas ĉe la vilaĝfino. Antaŭ la domo sta-

ras du mandarinarboj, orde stucitaj kvazaŭ gigantaj verdaj fungoj.

Enirinte Pan Himej anoncis: “Avĉjo, gasto venas!”

Avo Ferulo leviĝis de la forno kaj profunde reverencis al mi. Mi sidiĝis, kaj la avo kaj nepino vigle servis al mi. Ili infuzis teon kaj plenigis pipon per tabako por mi. Kaj momenton poste, freŝa aromo emanis el orflava maizaĵo surtable. Avo Ferulo levis bambuan fotelon kaj en bovlon verŝis brandon. Ankoraŭ ne lipuminte la trinkaĵon mi jam ebriiĝis de la profunda gastamo de la jaŭ-nacia familio.

Post vespermanĝo Pan Himej eliris. La avo komencis buti la du mandarinarbojn per krescenta ŝpato. Post tio, li atente pritondis iliajn branĉojn. Li diris al mi, ke la du arbojn, trovitajn en malproksima loko, li plantis la duan tagon post enloĝiĝo en Laĝukoŭ, kaj de tiam pasis jam kvin jaroj.

“Fruktos ili post du-tri jaroj!” mi rimarkigis.

“Ĉu vere?” ĝoje ekridis la maljunulo, “tiam do Himej havos mandarinojn! Tion ŝi volas jam de la infanaĝo... Antaŭ longe mi jam volis planti. Sed kie? Eĉ la subplanda terpeco apartenis al la montmastro!” La vortoj turniĝis al la nova vivo hodiaŭ. Ĝojo vibris en lia tono, kontenta rideto ludis sur lia vizaĝo.

Kiam lunarko leviĝis, revenis Pan Himej. Ŝi blovincitis fajron en la forno kaj ŝia avo rostis maizgrajnojn por regali gastojn. Post momento gejunuloj el la vilaĝo venis unu post alia en la domon en lunlumo. La junuloj trinkis varman teon ĉirkaŭ la fajro, kaj la junulinoj, duope aŭ triope, sidis brakumante unu alies ŝultron. Jen iu, kun mentono apogita sur la mano, komencis la unuan kadencon, kaj tuj sekvis ceteraj tute nature. Ili prikantis bluan monton kaj lazuran akvon, prikantis la burĝonantan vivon kaj sian profundan amon al la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ.

Apenaŭ paŭzis la kanto, mi vidis ke Pan Himej brodas sub lampo mantukon kudreron post kudrero, kun klinita kapo sin apogante al la fenestro. De tempo al tempo ŝi ĵetis enpensan rigardon al fora monto sub la luno. Ŝi estis ŝpinanta novan kanton.

Jen sur ŝia mantuko videblis nur konturo de bluaj montoj, inter kiuj serpentumis kelkaj oraj fadenoj.



Kian ĉarman bildon ŝi elbrodos kaj kian korduŝan kanton ŝi ŝpinos? . . .

En la sekvinta tago, adiaŭante min, Avo Ferulo diris sub la mandarinarboj:

“Venu, kamarado, kaj manĝu ĉe ni mandari-  
nojn venontfoje!”

“Certe!” mi respondis.

Pan Himej akompanis min ĝis la montsupro. Ĉe la disiĝo, forte premante al mi la manon, ŝi diris: “Kamarado Li, venu refoje al nia montaro per aŭto!”

## II

Antaŭ tri jaroj, Pan Himej diris, ke mi venu al la montaro de jaŭoj per aŭto. Kaj nun, efektive realiĝis ŝia deziro.

Kiel birdo, la aŭto flugis al la verd-verda montaro de jaŭoj.

Iun tagon, mi hazarde vidis popolkanton en notlibro de juna Ĝaŭ en la gubernia kultura stacio. La titolo estis “Kanto de Migrantaj Montanoj”. Ekbrilis miaj okuloj kaj mi tuj legis laŭvorte:

*Migrad' de mont' al monto;  
hodiaŭ l' jaŭoj ĝojas en la nova mondo.  
Similas birdan flugon nun la montascendo,  
similas akvofalon nun la montdescendo.  
En orienta vent' de varma mart', en koro  
burĝon' de ĝojo floras je l' printempa horo.  
Se jaŭoj spiras kanton dise en l' aeron,  
ĝi tuj allogas grandan svarmon da abeloj.*

Konata formo, konata ritmo. Bedaŭrinde mankis melodio. Juna Ĝaŭ diris ke jam ekzistas kaj ekkantis. Jen la melodio identa al tiu kiun mi aŭdis de Pan Himej antaŭ tri jaroj. Tamen ŝanĝiĝis la taktoj kaj humoro, simile al la pado en la jaŭa montaro kiu larĝiĝis en hodiaŭan ŝoseon.

“Kie vi aŭdis ĝin?” mi demandis junan Ĝaŭ.  
“En vilaĝo Kjuŝuj,” li respondis.  
“Kiu kantis?”  
“Pan Himej.”  
“Ĉu tiu de Laĝukoŭ?”  
“Ĝuste ŝi!”

De juna Ĝaŭ mi informiĝis, kiel Pan Himej kaj Avo Ferulo vivis en la lastaj jaroj kaj kiel naskiĝis tiu nova “Kanto de Migrantaj Montanoj”.

Pasintjare, la somera vento disblovis tra la vasta montaro de jaŭoj la ĝojigan novaĵon ke ĈPLA-anoj venis al la vilaĝo Kingmej aliflanke de la monto por konstrui ŝoseon.

Pan Himej adiaŭis la avon kaj sin anoncis al la ŝose-konstrua brigado kaj fariĝis vilaĝa konstruanto.

Kian laboron ŝi ne faris en la konstruejo? En serena tago, ŝi ŝvitis tutkorpe, ne konis lacon; en pluva tago, ŝi plene kovriĝis per koto. Krevis la manoj, ŝveliĝis la ŝultro sed ŝi neniam kuntiris la brovojn. Ŝi aspektis ĉiam tiel trankvila kaj serioza. Ĉiutage kiam finiĝis laboro, ŝi eksidis en la vesperruĝo kaj ridetis aŭdeble, karesante per la okuloj la ŝoseon, antaŭen etendiĝantan metron post metro.

Sed ŝi ne atendis, ke la avo en tiuj tagoj dronis en ĉagreno. La maljunulo ne povis kompreni kial konstrui ŝoseon en la loko bonorda. Tage, sidante antaŭ la pordo li gapis al la du mandarinarboj. Post sia plantiĝo fruktas persikarbo post tri, prun-arbo post kvar kaj mandarinarbo post ok jaroj. Ĉijare estas ĝuste fruktodona tempo. Kaj nokte, li turniĝadis sur la lito, ne povante endormiĝi.

Pasis unu monato, du monatoj, kaj mineksplodoj proksimiĝis al Laĝukoŭ. Zorgate de la vilaĝa registaro la vilaĝanoj transloĝiĝis transmonten ĉe Kjuŝuj-riveron, kie la registaro konstruigis jam novajn domojn. Sole Avo Ferulo restis en sia surfosta domo. Pan Himej revenis admoni lin: “Avĉjo, transloĝiĝu! Mi jam iris kaj vidis, ke tie estas belaj montoj kaj akvoj. Kaj la domo estas pli vasta ol tiu ĉi.”

“Eĉ ora monto kaj arĝenta akvo ne povas logi min!” Li levis siajn okulojn al la mandarinarboj kaj eksilentis.

Venis la vilaĝestro. Li longe persvadis la avon kaj fine konvinkis lin. Post kelkaj tagoj, la ŝoseo jam etendiĝis en la vilaĝon kaj oni devis forigi la domojn kaj tiam Avo Ferulo ŝanĝis sian decidon. Pan Himej perdis paciencon kaj eklevis hakilon por faligi la fruktarbojn. Tiam la avo diris: “Himej, por vi mi plantis la mandarinarbojn!”

Ĝuste tiam aŭdiĝis laŭta krio: “Venas la guberniestro!”

Pan Himej turnis la kapon kaj ekvidis alproksimiĝi la guberniestron kun blanka ĉevalo. Li salutis ĉiujn kaj, ĵetinte rigardon al la mandarinar-

boj, diris: “Jam kun fruktoj, estas domaĝe forhaki ilin. Sed ne gravas. Kiam trafikos aŭtoj, ni alportu bonajn mandarinajn arbidojn kaj priplantu la tutan montaron de jaŭoj!” Li suriris la surfostan domon kaj profunde riverencis al Avo Ferulo. Kun la manoj levitaj antaŭen li diris: “Transloĝigu, onklo! Mi altiris ĉevalon, bonvolu surĉevaligi por transmontigi. Ĉu bone?” Malrapide stariĝante, la avo stulte rigardis al la guberniestro: “Guberniestro...” Li plorsingultis kaj la gorĝo ŝtopiĝis. Larmeroj ruliĝis sur liaj vangoj kaj falis sur la baskon. En kiu tempo, pripensu, jaŭoj ricevis tian amon profundan kiel maro!

Tiamaniere Avo Ferulo transloĝiĝis. Transirante monton al Kjuŝuj-vilaĝo, Pan Himej ekkantis novan “Kanton de Migranta Montano”, ne povante reteni sin de ĝojo.

“Post tio,” juna Ĝaŭ daŭrigis, “la ŝoseo estis konstruata plue. Avo Ferulo frekventis Pan Himej por porti al ŝi manĝaĵon kaj admonis ŝin: ‘Kna-bino, satigu vin kaj laboru energie! Rapide finkonstruu la ŝoseon, por ke via avo veturu el la montaro kaj rigardu tie la mondon!’”

“De la komenco ĝis la fino de la konstruado Pan Himej laboris kun ĝisĉiela entuziasmo. Ordinare ŝi estas kvieta, sed en decida tempo ŝi viglas kiel arda fajro. Iufoje, eksplodis monta torentego. Kiam vilaĝanaj konstruantoj estis solidigantaj la nove starigitan pontframon, abrupte flosego dekabliĝis kaj sin ĵetis rekte kontraŭ la pontframon kaj ĝin minacis. Aŭdiĝis konsternitaj krioj. Tiam, iu figuro saltis de trimetre alta kurtaĵo sur la galopantan flosegon, levis longan bambuan hokstangon kaj forte puŝis per ĝi la flosegon dufoje dorsen-dekstren. La stango kurbiĝis kiel arko kaj rektiĝis, denove kurbiĝis kaj denove rektiĝis. Tiamaniere la nazo de la flosego turniĝis kaj kaptiĝis inter du rokoj de la bordo. ‘Brave!’ ektondris jubiloj. Post atenta rigardo oni rimarkis ke sur la flosego staras junulino. Kiu do? Oni ja ne atendis, ke tiu estas neniu alia ol Pan Himej, kiu ne emas montriĝi ordinare. Kaj kiam finkonstruiĝis la ŝoseo, Pan Himej estis elektita kiel modela volontula konstruanto kaj elstara membro de la Junulara Ligo.”

Post la rakonto de juna Ĝaŭ, min des pli tiklis la deziro vidi Avon Ferulon kaj Pan Himej. Sed bedaŭrinde tiuvespere la oficejo telefone revokis min kaj la intenco ne efektiviĝis.

Pasis ankoraŭ dek jaroj, kiam venis aŭtuno de 1969.

Kiel membro de la provinca pririgarda delegacio pri “lerno de Daĝaj en agrikulturo” mi ricevis ŝancon triafoje iri en montaron de jaŭoj. Nepriskribebla estis mia emocio, kiam mi vidis, ke Pan Himej starante aplombe sur podio raportas per fonte klara voĉo spertojn de Lugiaŭ-anoj en lernado de Daĝaj.

Mi promenis kun Pan Himej sur la ŝoseo, borderita per pli ol dek metrojn altaj poploj, plantitaj antaŭ dek jaroj. Irante ni interparolis, sed, same kiel en konatigo de spertoj sur la podio, ŝi lerte evitis tuŝi sin. Tamen kiom da laŭdoj pri ŝi mi aŭdis el la buŝo de aliaj kamaradoj!

Antaŭ kvin jaroj, por konstrui akvorezervejon Kjuŝuj-vilaĝanoj apud Kjuŝuj-rivero transloĝiĝis al Lugiaŭ. Vizaĝe al la sovaĝa monto kun primitivaj arbaroj la juna sekretariino de la partia filio proklamis al la komunumanoj:

“La surfostaj domoj sur la tero estas konstruitaj kaj la floroj sur kaptuko estas broditaj. Gekamaradoj, ek al laboro!”

Printempe, ŝi direktis flosen en ondoj kaj paŝtis ŝafojn en nebulo; somere, ŝi penetris profunden en arbaron por kolekti rezinon, spite ke rezino gluiĝis al ŝia kapo; aŭtune, kun akra falĉilo ŝi persekutadis taŭzitaĵajn herbojn; vintre, kun trafema pafilo, ŝi ĉasadis aprojn kaj ibeksojn. Firme strebante por la revolucio, kun idealo en la koro ŝi elvolvis la forton de la amasoj, batalantaj kun ŝi unuanime. En la lastaj kvin jaroj ŝi diligente laboradis kaj peneme luktadis kontraŭ malfaciloj. Dank’ al tio, en la tuta Lugiaŭ-brigado ĉio prosperiĝis: densas la verdaj forstoj, abundas grenoj, ridas la akvo, gajas la komunumanoj...

Irinte certan distancon, Pan Himej kondukis min en montvalon kaj ŝi diris: “Baldaŭ ni atingos Lugiaŭ.”

Antaŭen irante mi trovis, ke pli kaj pli vastas la valo. Kiam ni trairis pinaron, aperis antaŭ ni vasta mirinda sceno de montregiona nokto kvazaŭ post leviĝo de kurteno. Hele brilas la luno en la firmamento, kaj la altaj montpintoj en la fono de la ĉielo simila al blua pluŝo aspektas eksterordinare grandiozaj. Supre fajro de noktogardantoj flagras vigle kaj malsupre glimbrilas elektraj lampoj, kvazaŭ fajreroj saltintaj el la fajro. En la lumo de la fajro kaj luno malklare vidiĝas maizoj, sorgoj

kaj rizplantoj senbrue ondetantaj en ŝtuparaj kampoj...

Ĉe alia kurbiĝo de la monto, maso da fajro ludis kun vento, lumigante triangulan fabrikan domon.


“Kiu?” aŭdiĝis voĉo de maljunulo.

“Estas mi, avĉjo!” alkriis Pan Himej, “venas honorinda gasto.”

“Avo Ferulo!” mi levis la voĉon.

Brila lumfasko de elektrotorĉo pafiĝis sur mian vizaĝon. Eliginte “Aha!” la maljunulo grandpaŝe aliris kaj kaptis miajn manojn.

“Ĉu vi ankoraŭ min memoras?” mi demandis.



“Hahaha! Kial ne? Vi gastis ĉe ni, ja neforgeseble!”

Tiam eksonis korno. La avo haste prenis bambuan klakilon kaj energie frapis. Ne turnante la kapon li svingis la manon: “Kamarado, mi havas taskon. Ĝis morgaŭ!”

Kun rideto mi adiaŭis lin.

“Li ŝajnas pli juna ol antaŭ dektri jaroj.” Mi rimarkis.

“Kompreneble,” respondis Pan Himej. Tiam lian koron okupis nur du mandarinarboj kaj unu surfosta domo!”

Ni iris plue antaŭen, tretante la ombron de arboj apud rivereto. Pan Himej plukis kelkajn grenerojn kaj ilin maĉinte diris: “Morgaŭ ni devos komenci falĉi.”

Fine, kiam mi kun Pan Himej suriris altaĵon kun pinoj, subite la luno falis antaŭ niajn piedojn. Sub la lunlumo impete saltis blankaj punktoj. Mirigite mi rondigis la okulojn.

“Jen akvorezervejo de ni konstruita pasintajare.” Ankaŭ la kvietaj Pan Himej ekridetis, ne povante reteni elkoran ĝojon.

“Ŝajne kun bredataj fiŝoj.” mi diris.

“Jes. Ruĝaj karpoj el Dongting-lago estas venigitaj sur nian monton.” Poste ŝi aldonis: “Morgaŭ mi kaptos kelkajn por regali vin.”

“Bone!” Kaj mi diris kun admiro: “La jaŭoj en Lugiaŭ kreis miraklon, transforminte montojn kaj veniginte akvon por la revolucio!”

“Tion ne diru,” Pan Himej skuis la kapon, “ni faris tro tro malmulte, kompare kun Daĝaj!”

Kiam ni venis al la domo de Pan Himej, la luno kliniĝis jam okcidenten. Ŝi ŝaltis elektrolampon kaj mi, kun miro kaj ĝojo, rimarkis brodaĵon sur la muro. Miniaturado de la jaŭa montaro estas brodita per silkaj fadenoj de sep koloroj, sur neĝ-blanka sateno: verdaj montoj, lazura akvo, ruĝaj flagoj, smeraldaj arboj, ora ŝoseo, flava mandarina ĝardeno, fabriko kaj ŝtuparaj kampoj... Ĝuste tiun ĉi blankan satenon Pan Himej brodis, — mi subite rememoris, — en tiu nokto antaŭ 13 jaroj, kiam mi gastis en Laĝukoŭ.

Ĉe mateniĝo min vekis la montaj birdoj. Mi iris el la ĉambro. La sepjara filineto de Pan Himej sidis antaŭ la forno por zorgi pri la fajro. Vidinte min ŝi avertis min kun levita fingro kaj paro da brilaj nigraj okuloj: “Silentu! Panjo legas verkon de Prezidanto Maŭ.”



## Huj-nacio

**H**UJ-nacio estas unu el la relative grandaj nacimalplimultoj de Ĉinio. Ĝiaj kvar milionoj da membroj loĝas ĉefe en la Ninghia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono, Gansu-provinco, la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono kaj Kinghaj-provinco en nordokcidenta Ĉinio, relative multe en la provincoj Henan, Hebej, Ŝandong kaj Junnan kaj en plejparto de la gubernioj kaj urboj de nia lando loĝas huj-oj.

Huj-nacio estas mallongigo de la nomo “Huj-huj-nacio”. En la sepa jarcento p. K., malmultaj el la persoj kaj araboj, kiuj venis al Ĉinio por fari komercadon, fiksloĝis en Kantono, Jangĝoŭ, Kjuanĝoŭ, Hangĝoŭ, Ĉang-an (la nuna Hi-an) kaj aliaj urboj. Post la 13-a jarcento, en Ĉinion transloĝiĝis nombro post nombro da mez-aziaj, persaj kaj arabaj islamanoj, inter kiuj estis terkulturistoj, metiistoj, soldatoj, komercistoj, oficistoj kaj misi-

istoj. Iom post iom ili kunfandiĝis kun hanoj, mongoloj, ujguroj k.a., kaj tiel formis huj-nacion. Huj-nacianoj parolas en la han-a lingvo, kredas Islamon kaj sin okupas ĉefe pri agrikulturo.

La huj-oj estas laboremaj, bravaj kaj saĝaj. De la dinastioj Juan kaj Ming, la huj-aj kamparanoj ekspluatis virgan teron kaj bredis brutojn kune kun han-aj kaj ali-naciecaj popolanoj en internaj kaj landlimaj regionoj, ĝiaj metiistoj estis lertaj tiel en farado de incenso, medikamentoj, ledo kaj kanonoj kiel en ekspluatado de minoj kaj fandado de ercoj, kaj ĝiaj komercistoj ludis aktivan rolon en ekonomia interrilatiĝo inter internaj kaj landlimaj regionoj.

En la longa periodo antaŭ la Liberiĝo, la hujoj, same kiel aliaj nacianoj, plene suferis de la persekutado kaj prirabado fare de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo kaj havis nenium rajton

Eksonis sonorilo. En la lazura mateno, vico post vico da komunumanoj kantante marŝis al la oraj ŝtupkampoj. El ili iuj tenis brilajn falĉilojn, aliaj portis draŝmaŝinon, kaj triaj puŝis pneŭmatikajn ĉaretojn. Sur la renforma draŝejo ĉe la vilaĝfino, ekbruis dizelo, kaj el maiz-draŝ-maŝino falis ora kaskado. Malpli proksime en bambua budo kotonsensemigilo kirladis ŝvebajn blankajn nubojn. La matenruĝo emergis el la horizonto kaj pendis super la jaŭaj montvilaĝoj kiel ruĝa festa gazo.

Tiam defore, transe de la monto, alflugis motorbruado de aeroplano. Oni instinkte levis serĉantan rigardon al la altega firmamento. La aviadilo tamen penetris el la matenruĝo kaj preterflugis Lugiaŭ-vilaĝon trans okcidentan monteĝon. Subite el ĝi pluvis io.

“La aviadilo disŝutas arbosemojn!”

“La aviadilo dissemas arbosemojn!”

Svarmis al la okcidenta monteĝo homoj el la domoj, de deklivoj, ŝtupkampoj kaj kanaletoj.

“Panjo!” vokis la knabineto.

Pan Himej levis ŝin sur rokon kaj ĉi tiu brakumis ŝian kolon kaj demandis:

“Ĉu la aviadilo, panjo, semas arbojn por ni jaŭoj?”

“Jes, jes!” diris Pan Himej kun tremanta voĉo.

“Ĉu sendita de Prezidanto Maŭ, panjo?”

“Jes, jes!” la nigraj okuloj de Pan Himej vualiĝis de akvo.

Leviĝis la suno, la ruĝa suno prilumanta la universon!

Per la tuta gorĝo ekkantis Pan Himej alian novan “Kanton de Migrantaj Montanoj”:

*Migrad' de mont' al monto;*

*altegas la ĉiel' kaj vastas horizonto.*

*Simile al feniks' el ora elemento*

*leviĝis jaŭoj supren al la firmamento!*

*Murmuras klara fonto sur la jaŭa monto,*

*folia fajfmuziko flugas tra la mondo.*

*Kaj l' montoj ĉiuj kune ĥoras por aklamo*

*al Prezidanto Maŭ por liaj zorg' kaj amo.*

**Ilustritaj de Gin Geĝong**



*Ding Hjueli (la meza), vicedestro de la revolucia komitato de Guĉeng-brigado de la Ninghia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono kaj membroj de la scienca grupo ekzamenas rizplantojn.*

en politiko, kaj longe restis postgigintaj kaj senprogresaj en ekonomio kaj kulturo. La hujoj loĝantaj en antaŭurbo estis plejparte etkomercistoj aŭ kolportistoj kaj vivis nestabilan vivon. En la nordokcidenta huj-a regiono, la fekunda tero estis okupita plejparte de la oficistoj, bienuloj kaj imamoj. Kaj 70-80 procentoj de la hujoj estis analfabetoj.

Pro suferado de kruela subpremado, la hujoj havas tradicion de brava batalo. Ili partoprenis en la kamparana insurekcio en la lastaj jaroj de Ming-dinastio kaj batalado kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo dum la lastaj cent jaroj. Antaŭ la Kontraŭjapana Rezistmilto, sin trovis huj-a divizio en la Ruĝa Armeo en la limregiono de Ŝenhi, Gansu kaj Ninghia, kaj hujaj taĉmentoj organiziĝis dum la rezistmilto ankaŭ en Bohaj-regiono kaj meza Hebej. Sub la gvido de la Partio, ili faris gerilan militon postfronte de la malamiko.

Post la Liberiĝo, sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, en huj-aj lokoj efektiviĝis politiko de nacia aŭtonomio, kaj stariĝis la Ninghia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono, Lin-

hia-a Huj-nacia Aŭtonoma Subprovinco de Gansu-provinco kaj Ĉanggi-a Huj-nacia Aŭtonoma Subregiono de Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. Kaj aŭtonomaj gubernioj stariĝis en huj-aj lokoj de Gansu, Kinghaj, Hingiang, Hebej, Gujĝoŭ kaj Junnan.

En la komenca periodo post la Liberiĝo, la emancipita huj-a popolo ekstermis banditojn kaj tiranojn kaj efektivigis agraran reformon, kaj per tio disfalis la bazon de la regado de la feŭda bienula klaso. En la jaro 1958, ili likvidis kaj abolis ankaŭ la religian sistemon de subpremo, ekspluato kaj feŭdaj privilegioj longe ilin katenantan. Laŭ la politiko de la Partio pri libereco de religia kredo, la ordinara religia vivo de diverslokaj hujoj estas respektata. Kaj la lokaj registaroj donas apartan zorgon al ili en iliaj festoj. Por zorgi pri la apartaĵoj de hujoj en ilia vivo, multaj el niaj urboj stariĝis specialajn manĝejoj kaj fakon en ĉefaj butikoj por ili.

Kun la prospera disvolvigo de nia socialisma konstruado ankaŭ la industria kaj agrikultura



produktado en la huj-aj aŭtonomaj distriktoj ricevis rimarkindan disvolviĝon. Antaŭ la Liberiĝo, en la tuta Ninghia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono ne estis moderna industrio krom kelkaj simplaj farejoj kun pli ol 300 laboristoj, sed nun stariĝis tie industrioj de metalurgio, hejtadoj, kemio, elektro, maŝinfarado, konstruaj materialoj kaj ŝpinteksado. La totala produkta valoro de industrio de Jinĉuan, ĉefurbo de la aŭtonoma regiono, kreskis 105-oble kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo.

Sub la direktado de la principo de Prezidanto Maŭ “**preni agrikulturon kiel la bazon kaj industrion kiel la gvidan faktoron**”, granda sukceso estas akirita ankaŭ en la agrikultura produktado en diversaj huj-aj lokoj. Dum la lastaj dudekkelkaj jaroj, hujoj kune kun hanoj de la regiono efektivigis la Okpункtan Ĉarton por Agrikulturo\* kaj aktive faris akvoutiligan konstruadon batalante kontraŭ superakvo, salalkalo kaj sablovento. Ili konstruis 179 elektrajn pumpstaciojn, tiel ke la irigaciata areo de la tuta regiono pli vastiĝis de 100,000 hektaroj antaŭ la Liberiĝo ĝis la nunaj pli ol 200,000 hektaroj, kaj la produktokvanto de greno multe kreskis. Guĉeng-brigado de Guĉeng-komunumo, Vuĝong-gubernio, kie loĝas multaj hujoj, estis antaŭe mizera loko. Nun ĝi fariĝis ruĝa flago en la tuta aŭtonoma regiono en lernado de Daĝaj en agrikulturo, dank’ al la penema luktado de la vastaj amasoj en malfa-

ciloj kun la spirito de sinapogo sur propraj fortoj kaj aktiva disvolvo de scienca eksperimentado, kaj akiris sinsekvajn riĉajn rikoltojn depost la jaro 1962.

Ankaŭ la kultura kaj eduka afero estas atentata en diversaj huj-aj lokoj, kaj en ili funkcias specialaj elementaj kaj mezaj lernejoj por hujoj. Nun en la vasta kamparo de tiuj lokoj, iliaj gefiloj povas viziti elementan lernejon en la produkta brigado kaj mezlernejon en la komunumo. En la aŭtonoma regiono stariĝis Ninghia-a Universitato, Ninghia-a Medicina Instituto, Ninghia-a Agronomia Instituto k.a. superaj lernejoj. En la pasinteco, la huj-aj virinoj en la Nordokcidento suferis plej profundan subpremado kaj la malnovaj moroj multe katenis ilin. Multaj el ili eĉ neniam povis eliri el sia domo kaj partopreni en socia aktivado dum dekoj da jaroj. Dank’ al la atento kaj zorgo de la Partio post la Liberiĝo, tiu stato jam tute ŝanĝiĝis. Multaj el ili laboras kiel ŝtataj kadroj, aliaj fariĝis gvidantoj de fabrikoj kaj aliaj entreprenoj kaj triaj, kiel milicianoj, defendas la limon de la patrolando. Egalaj al viroj ili fariĝis grava forto por la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado en sia loko.

*\*La ok punktoj de la Ĉarto estas: profunda plugado kaj grundoplibonigo, sterko, akvoutiligo, elektado de semo, racia densa plantado, plantprotektado, prizorgo de kampo kaj reformo de instrumentoj.*



# Magneta Kompasso

**Ĉ**INIO estas la lando, kiu plej frue inventis magnetan kompason en la mondo.

Kvankam magneta kompasso estas simpla instrumento en la nuna tempo kun rapide progresintaj sciencoj, ĝi tamen estas tre utila kaj nemalhavebla ilo por navigado, prospektorado kaj esplorado.

Kiel do ĝi estas inventita?

## LA PLEJ FRUAJ DIREKTOMONTRILOJ

Antaŭ pli ol 2,000 jaroj en la Epoko de Batalantaj Regnoj, la ĉina popolo jam eltrovis magneton kaj akumulis sciojn pri ĝi. La eltrovo de magneto pretigis kondiĉojn por inventi magnetan nadlon.

Tiam nia popolo faris specon de direktomontrilo per magneto, kiun oni nomis sudo-montrilo. Diferenca de la hodiaŭa kompasso, ĝi estis farita el natura magneto en formo de kulero kaj metita en bronza telero. Se oni turnas la tenilon de la

“kulero”, la tenilo ĉiam montras al la sudo, kiam la turniĝo ĉesas. Tio estis la plej frua direktomontrilo en la mondo. En tiu tempo, homoj kunportis tian instrumenton irante al montaro por kolekti jadon, pro timo de orientoperdo. Ĉar tiu instrumento estis neoportuna kaj malfacile farebla, oni daŭre klopodis por ĝin reformi.

En la komenca periodo de Norda Song-dinastio (960-1126 p.K.), nia laboranta popolo kreis alian orientilon — sudomontra fiŝo. Tio estis farita el ŝtala lameno en formo de fiŝo, kiu povis flusi sur akvo. Unue oni tenis ĝin kun magneto en hermeta skatolo, por ke ĝi estu magnetizita; poste oni metis ĝin en akvoplenan bovlon kaj tiam ĝi povis montradi la nordon. Tiu instrumento estis pli oportuna ol sudo-montrilo.

## MAGNETA NADLO

La eltrovo de la magnetiza metodo grandpaŝe antaŭenpuŝis la inventon de magneta nadlo. Ne longe post la eltrovo de ŝtala sudomontra fiŝo, oni frotis ŝtalan nadlon kontraŭ magneto kaj tiamaniere turnis ĝin en magnetan nadlon.

En la periodo de Norda Song-dinastio, ĉina fama sciencisto Ŝen Kuo (1031-1095 p.K.) faris eksperimentojn per tia nadlo. Li flosigis magnetan nadlon en bovlo per helpo de alpinglitaj junkaj pecetoj kaj tiam la nadlo montris al la nordo; kaj li pendigis meze vaksitan magnetan nadlon per maldika fadeno en senventa loko, kaj ankaŭ tiam la nadlo montris al la nordo. Post detala observado Ŝen Kuo trovis, ke la direkto montrata de la nadlo ĉiam iom devias orienten. Per tiu eltrovo li faris kontribuon al la scienco.

*Kulersimila sudo-montrilo*



Ĉinio ne nur plej frue inventis magnetan nadlon, sed ankaŭ plej frue ĝin aplikis en mara navigado.

En Kin-dinastio antaŭ 2,000 jaroj, ĉinoj jam faris maran navigadon. Post la dinastioj de Kin kaj Han, ankoraŭ pli multe disvolviĝis la mara trafikado de nia lando. En la periodo de Ĝin-dinastio (265-420 p.K.) oni jam veturis per ŝipo al Hindio. Tiam unu mara ŝipo povis enteni 200 personojn. Navigante sur maro oni povis sin orienti en serenaj tagoj. Kion fari do en nubozaj kaj pluva tagoj? La invento de magneta nadlo solvis la problemon.

Laŭ historia literaturo, en Norda Song-dinastio kantonaj ŝipoj jam aplikis magnetan nadlon. En sia libro verkita post plenumo de laboro en

Koreio, Ĝu Ging de tiu periodo skribis, ke en nubozaj tagoj ili uzis flosantan nadlon por sin orienti sur maro.

En Suda Song-dinastio (1127-1279 p.K.) navigistoj jam komencis uzi kompason kun gravuritaj ideografiaĵoj por indiki la direktojn, dank' al kies helpo oni povis facile orientiĝi dum navigado.

Dum longa praktikado de mara navigado, oni trovis multajn navigajn vojojn, kiuj estis siatempe nomataj "Nadlo-vojoj" pro tio, ke ili estis trovitaj helpe de magneta nadlo.

En la 11-a jarcento, niaj maraj ŝipoj navigis al Sudorienta Azio kaj Arabio, kaj kompasoj kaj ĝia farado estis disvastigitaj tra tiuj lokoj al Eŭropo kaj aliaj partoj de la mondo. La apliko de kompasoj en mara navigado akcelis kaj la disvolviĝon de mara trafiko kaj la ekonomian kaj kulturen interŝanĝon inter diversaj landoj.



## Orfinoj Ne Sentas Sin Orfaj

de GONG HIN

**E**N numero 4 de Dongjia-strateto de Tiangin loĝas kvar orfinoj, kies gepatroj mortis de malsanoj unu post la alia en 1969 kaj 1972. La plejaĝa el ili estas 17-jara kaj la plej juna 6-jara. Antaŭ nelonge mi vizitis ilin en dimanĉo.

Enirinte ilian domon mi rimarkis, ke en la pura ĉambro estas orde metitaj legomoj, rizo, faruno kaj vivbezonaĵoj; Liu Ĵonkin, la plejaĝa el la knabinoj, estas absorbite leganta libron; Liu Ŝukin, la dua el ili lavas vestojn por siaj pli junaj fratinoj; Liu Fengkin kaj Liu Hongkin lernas skribadon. Post iom da tempo kelkaj malgrandaj lernantoj venis en la ĉambron por relerni lecionon kune kun Feng-

kin, ĉar tie funkcias ilia eksterlerneja studgrupo laŭ la decido de ilia instruisto. Post sia studo la kunlernantoj ankoraŭ helpas ilin fari dommastrumajn aferojn.

Post la morto de iliaj gepatroj, la Partio kaj registaro bone ilin prizorgas ĉiuflanke. La kostoj de la enterigo de la mortintoj estis pagitaj laŭleĝe de la ŝtato; kaj la fabriko, en kiu la gepatroj laboris antaŭe, donis al la orfinoj pensiojn kaj helpis ilin aranĝi la vivon kaj solvi malfacilojn.

Post sia diplomiĝo el la mezlernejo Ĵongkin eklaboris en la Laborista Kultura Palaco. Informiĝinte, ke ŝi estas orfino, la gekamaradoj de la palaco ĉiuj helpas ŝin kudri vestaĵon kaj ripari la domon.

Precipe onklino Li Ĝinĝen, kiu loĝas en la sama korto, ilin zorgas kiel ilia propra patrino, lernigante al ili kiel prepari manĝon, fliki vestojn kaj fari mastrumadon. Kiam Hongkin malsaniĝis, la onklino kaj Ĵongkin kune sendis ŝin al hospitalo; kaj por ke la pliaĝaj fratinoj povu ĝustatempe iri al la oficejo kaj lernejo, la onklino persone flegis Hongkin, tiel ke la lasta rapide resaniĝis. Krome la onklino ofte diras al la knabinoj ke ili progresu kaj ne forgesu la mizeron spertitan de ilia patro kiel orfo en la malnova socio.

Nun la kvar knabinoj sane kreskas same kiel ĉiuj aliaj geknaboj de la nova Ĉinio.



# Nova Abontarifo de E. P. Ĉ.

(Validas ekde la 1-a de julio de 1973)

Lando	Valuto	1-jara abono	2-jara abono	3-jara abono
Argentino	peso argentina	12	18	24
Aŭstralio	\$ aŭstrala	1.20	1.80	2.40
Aŭstrio	ŝilingo aŭstra	40	60	80
Belgio	franko belga	90	135	180
Britio	£ brita	0.90	1.35	1.80
Ĉilio	eskudo ĉila	46	69	92
Danlando	krono dana	14	21	28
Finnlando	marko finna	7	10.50	14
Francio	franko franca	10	15	20
FR Germanio	marko germana	6	9	12
Grekio	draĥmo greka	50	75	100
Hispanio	peseto hispana	100	150	200
Irlando	£ irlanda	0.90	1.35	1.80
Islando	krono islanda	170	255	340
Italio	liro itala	1300	1950	2600
Japanio	eno japana	600	900	1200
Jugoslavio	dinaro jugoslava	30	45	60
Kanado	\$ kanada	2.20	3.30	4.40
Kolombio	peso kolombia	23	34.50	46
Luksemburgo	franko luksemburga	90	135	180
Meksiko	peso meksika	15	22.50	30
Nederlando	guldeno nederlanda	6	9	12
Norvegio	krono norvega	10	15	20
Nov-Zelando	\$ novzelanda	1.20	1.80	2.40
Peruo	solo perua	40	60	80
Svedio	krono sveda	10	15	20
Svislando	franko svisa	7	10.50	14
Urugvajo	peso urugvaja	1000	1500	2000
Usono	\$ usona	2.20	3.30	4.40
Venezuelo	bolivaro venezuela	5	7.50	10
aliaj eŭropaj landoj	£ brita	0.90	1.35	1.80
aliaj latinamerikaj landoj	\$ usona	1.00	1.50	2.00

## Sur la Kovrilo:

Geknaboj ekzamenas sian aeroplanan modelon.

## Sur la Dorskovrilo:

Hejlongtan de Ligiang, Junnan-provinco

### KOREKTOJ POR N-RO 5

Anstataŭ "1956" (p. 45 dekstre l. 6) legu "1856", kaj anstataŭ "ĝaŭng" (p. 27 vorto por la foto) legu "ĝuŭng".




Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO  
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 6 (179) 1973

## Ĉefa Enhavo

Inspektado de Samdek Norodom Sihanuk al la Liberigita Regiono de Kamboĝo .....	1
Disvolviĝo de Scienco kaj Tekniko de Nia Lando.....	8
Antaŭe kaj Nuntempe .....	14
Nova Kontribuo de Maljuna Sciencisto .....	18
Vizito al la Agronomia Instituto de Hinhiang-regiono...	20
Juna Laboristo-Teknikisto Jaŭ Ĝingong .....	24
Por Ĉiam Alta Produkto de Pomoj .....	27
Kresku Ankoraŭ Pli Rapide la Novaj Kadroj.....	31
Novaj Aferoj en Mjaŭ-vilaĝo .....	35
Karboskulptaĵo de Fuŝun .....	37
Dekmil-kilometra Vojaĝo en Ameriko .....	38
Londona Filharmonia Orkestro en Ĉinio .....	43
Ekspozicio de Verkoj de Japana Pentristo Hokusaj Kacuĉika en Pekino .....	44
Ekspozicio de Brita Industria Teknologio .....	45
Nova Monkrizo en Kapitalisma Mondo .....	46
Kanto de Migrantaj Montanoj (prozo) .....	49
Huj-nacio .....	54
Magneta Kompasso .....	57
Orfinoj Ne Sentas Sin Orfaj .....	58

# Kamelio



La genro de ĉinaj kamelioj inkluzivas multajn speciojn, kiel ekz. diversajn famajn te-arbetojn, oledonan kamelion kaj multajn speciojn de kamelioj kun belaj floroj. Ili plejparte kreskas en niaj sudaj provincoj. La ruĝflora oledona kamelio (*Camellia chekiangoleosa* Hu) de Ĝegiang kaj grandfrukta oledona kamelio (*Camellia gigantocarpa* Hu et T.C.Huang) de Bobaj estis novaj specioj trovitaj en 1965.

La unua kreskas en la sudaj partoj de la provincoj Ĝegiang, Anhuj kaj Hunan, en la nordorienta parto de Gianghi kaj la norda parto de Fugian. Ĝiaj floroj je 8-12 mm. larĝaj estas ruĝaj kaj tre plaĉaj.

La dua estis trovita en Bobaj-gubernio de Guanghi. Ĝiaj floroj je 12 mm. larĝaj, kun orflavaj stamenoj en blankaj petaloj, estas tre belaj. Tiuj ekonomiaj plantoj, kies semoj povas doni manĝeblan oleon, estas ankaŭ pririgardindaj florplantoj.

